

IPR

Driemaandelijks tijdschrift
Afgiftekantoor: Antwerpen X. ISSN 1013-2031

Jarkolekto 39 - trimonata

09/3

INTERNACIA PEDAGOGIA REVUO

Redakta komitato:

József Németh (red.)

Luiza Carol

Luigia Oberrauch Madella

Rob Moerbeek

Kunlaborantoj

de la aktuala numero:

Sjoerd Bosga

Duncan Charters

Aida Čížikaitė

Dennis Keefe

Maciej Klakla

Ilona Koutny

Adam Łomnicki

Stefan MacGill

Radojica Petrović

Michał Szlachetka

Magdalena Tatara

Mihai Trifoi



ilei

Organo de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj

ENHAVO

Stefan MACGILL: <i>Celoj kaj plenumoj</i>	3
Pri la 42-a Konferenco	
– <i>Inaŭguraj vortoj de la Prezidanto</i> (Radojica PETROVIĆ)	5
– <i>Komitato kaj nova estraro en Krakovo; Pri la ekzamena komisiono</i> (smg).....	7
– <i>Impresoj pri Krakovo, 2009</i> (Duncan CHARTERS)	9
– <i>Resuma raporto pri la 42-a ILEI-konferenco</i> (Aida ČIŽIKAITĖ)	14
– <i>LF kaj Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj en Krakovo</i> (Dennis KEEFE).....	19
– <i>La pola eksprese</i> (Magdalena TATARA)	22
Ilona KOUTNY: <i>Loke kaj fake, internacie kaj home</i> (Prof. István Szerdahelyi)	23
Radojica PETROVIĆ: <i>ILEI-seminario en Kinshasa</i>	30
<i>Tago de la Lernejo dum UK</i> (Mihai TRIFOI, Duncan CHARTERS).....	32
Maciej KLAKLA: <i>Formoj de aktivigado de lernantoj dum didaktika procezo</i>	34
<i>SUŚIO & SAKEO</i> (Michał SZLACHETKA)	39
<i>Kubo atendas vin!</i> (pri la 43-a ILEI-Konferenco)	40

ESTRARO DE LA LIGO

Prezidanto: Stefan MACGILL, Pannónia u. 30.I.6, HU-1136 Budapest, Hungario.

Tel. (+36 1) 349-5207, <stefan.macgill@gmail.com>.

Eksteraj rilatoj, kunordigo, konferenco, regularoj.

Vicprez.: Duncan CHARTERS, PO Box 100, Elsah, Illinois 62028-0100, Usono.

Tel. (+1) 618 3745252, fakso: (+1) 618 3745465, <duncan.charters@gmail.com>.

Universitata kaj scienca agado/komisiono, instru-teknologia evoluo.

Sekretario: Małgosia KOMARNICKA, adreso ĝis 15 junio 2010: E-Centro,

Grubenhagenstr. 6, DE-37412 Herzberg/Harz, Germanio.

<margareta.ilei.pollando@gmail.com>, Sekretariaj taskoj.

Estrarano pri financoj: Julija BATRAKOVA, Rusio/Hago, Nederlando. Tel. (+31)

252 515331, <persiko@mail.ru>. Financaj kaj kasistaj aferoj.

Estrarano: Zsófia KÓRÓDY, Esperanto-Centro, Grubenhagenstr. 6, DE-37412

Herzberg/Harz, Germanio. Tel./fakso (+49) 5521-5983,

<zsofia.korody@esperanto.de>. E-centroj, instrukapabligado, ekzamenoj.

Estrarano: Radojica PETROVIĆ, Bul. oslobođenja 36/14, RS-32000 Čačak,

Serbio. Tel. (+381 32) 371053, fakso: (+381 32) 342101, <radojica.petrovic.rs

@gmail.com>. Edukprojektoj, informado, terminara komisiono.

Estrarano: Julián HERNÁNDEZ ANGULO, Arbol Seco 371B e/Clavel y Santo

Tomás, Centro Habana, Ciudad Habana, Tel. (+53) 6404484,

<julian@esperanto.co.cu>, Landa agado. Komisiono pri lerneja agado.

Estrara komisiito por la Konferenco en Kubo: Ana MONTESINOS DE GOMIS,

Britio, <anamontesinos.esper@btinternet.com>.

Scienca Komitato

Prezidanto: Humphrey Tonkin,
Usono, University of Hartford;
AdE¹

Vicprezidanto: Detlev Blanke,
Germanio, Prezidanto de la Societo
pri Interlingvistiko

Membroj:

Vera Barandovská-Frank,
Germanio, Universität Paderborn;
AIS² San Marino

Duncan Charters, Usono, Principia
College, Elsah

Renato Corsetti, Italio, Università
degli Studi di Roma „La Sapienza”;
AdE¹

Probal Dasgupta, Barato, LRU,
Indian Statistical Institute, Kolkata;
AdE¹

Michel Duc Goninaz, Francio,
Université de Provence; AdE¹

Aloyzas Gudavičius, Litovio, Šiaulių
universitetas

Wim Jansen, Nederlando,
Universiteit van Amsterdam

Boris Kolker, Usono; AdE¹

Iłona Koutny, Pollando/Hungario,
Uniwersytet im. Adama
Mickiewicza w Poznaniu; AdE¹

Mauro La Torre, Italio, Università
degli Studi Roma Tre

Maria Majerczak, Pollando, Uniwer-
sytet Jagielloński w Krakowie

Geraldo Mattos, Brazilo, Federacia
Universitato de Paranao; AdE¹

Aleksandr Melnikov, Rusio,
Академия Сельскохозяйственного
Машиностроения

Radojica Petrović, Serbio,
Univerzitet u Kragujevcu

Balázs Wacha, Hungario, MTA
Nyelvtudományi Intézet


Sekretario: Aida Čižikaitė, Litovio;
estranaro de ILEI

¹ AdE – Akademio de Esperanto

² AIS – Akademio Internacia de la
Sciencoj, San-Marino

Celoj kaj plenumoj

Nova mandato, nova estrara teamo, freŝigitaj celoj, konstruata tri-jara plano. Jen la fruktoj el Krakovo. Plie en la mikso gravas sekurigi novan estraran kaj kolegan etoson – senton, ke ni havas komunajn kaj konkretajn celojn, ĉirkaŭ kiuj ni povas unuiĝi kun la preteco kunlabori por realigi ilin – kaj ene de niaj sekcioj, kaj rekte kiel parto de internacia plenuma teamo. Kiel povus aspekti la strukturo por liveri tion? Jen:



Tio ne signifas, ke ni opinias ke centrismaj organiza modeloj solvos ĉiujn problemojn. Abundas sukcesaj malhierarkiaj iniciatoj kiuj brile plenumas siajn celojn, kiuj cetere kongruas parte aŭ tute kun niaj ligaj celoj. ILEI en la nova mandato mal-kovros kaj ĝoje kunlaboros kun tiuj. Ni ne havas superflujajn laborfortojn por ripeti projektojn, kiujn aliaj jam bone faras.

Sed restas multaj kampoj kie ni mem devas elpaŝi je internacia skalo. La supra skemo proponas manieron

pli efike fari tion tra niaj komisionoj. Nur du el la kvin komisionoj sendis la statute postulatan raporton (kaj nur unu atingis la komitaton) do ni – prave aŭ malprave – konkludis ke la ceteraj ne funkciis. Ni devas rekonsistigi la komisionojn; en la konferenco ni komencis fari tion. Ili bezonas pli firman gvidon kaj pli regulan ligiĝon kun la estraro. Tiel ni kuraĝigu ilin formuli ne nur celojn, sed realajn planojn kun plenumantoj, limdatoj kaj rekontrolado. Tiel procedas ajna firmao aŭ libervola asocio kun sukces-ŝancoj. Do, ankaŭ ni. Pluraj komisionoj estos ekde nun gvidataj de estraranoj (ekzemplitaj kiel Komisiono A en la skemo): Duncan CHARTERS por la nove starigita komisiono pri universitata agado, Julián HERNÁNDEZ por la rekonsistigata komisiono pri lerneja agado, mi por la regulara komisiono. Aliaj komisionoj (kiel Komisiono B en la skemo) povos havi proprajn gvidantojn ekster la estraro, sed ĉiu havos enestran prizorganton. Ekz., Zsófia KÓRÓDY respondecos pri la ekzamena komisiono kaj Radojica PETROVIĆ pri la terminara komisiono, kie elektendas eksterestrara gvidanto. La raportoj de tiuj du komisionoj por 2008 troviĝas en nia hejmpaĝo. La estraro krome havas la rajton nomi komisiitojn.

Komisionoj kun vasta taskaro (do ne la regulara, elekta ks.) starigos liston de kunlaborantoj, por havi la necesan fakan kaj geografian atingon. Tiumaniere, la efektive funkcia internacia teamo ne limiĝas al la sepopa estraro, nek al la dudeko da komisionanoj, sed povos etendiĝi tra kvindeko de niaj plej aktivaj kaj kapablaj agantoj. Grupe, kohere kaj disciplinite, ni faros diferencon kaj atingos niajn celojn.

Kiujn celojn? Nu, la Komitato 90 minutojn post la formiĝo de la nova estraro jam povis debati proponon kaj, post kelkaj modifetoj, en la lasta konferenca tago aprobis la sekvon:

- Altigi la kapablojn de la esperantista instruistaro
diskonigi novajn teknikojn, organizi fakajn seminariojn...
- Akceli la universitatan agadon
E-kursoj, projektoj, instrukapabligo, programoj UPN, UAM, AIS...
- Organizati, stimuli kaj katalogi la instruadon de Esperanto
kunlabori kun ekzistantaj fortoj agantaj tiukampe
- Fortigi la instruistan trejnadon
kunlabori kun ekzistantaj fortoj, evoluigi ligan programon
- Subteni kaj realigi interkulturajn projektojn
ekz. InterKulturo, Flugiloj, IĈLM, Indiĝenaj Popoloj, AKEL...

- Starigi kaj subteni ret-kursojn
emfazi eblojn arigi retlernantojn en fizikajn renkontiĝojn
- Kunroli en informaj kampanjoj prepare al kursoj, lingvaj festivaloj, evoluigo de gvidiloj kiel anonci kaj okazigi kursojn...
- Fortigi la eksterajn rilatojn
ekz. ĉe UNESKO, FIPLV, ISAE, UMEA
- Disvastigi la ILEI-agadon en ĉiuj kontinentoj
projektoj, instruado, fondo kaj fortigo de sekcioj...

Pliaj celoj

- Reekzameni ekzamenojn
reklari la KER-ekzamenojn (UEA-ITK), cele al alpreno de nova liga sinteno, kiu klarigos kiel kaj kial KER kaj la UEA/ILEI sistemo povas funkcii paralele
- Pritaksi kaj katalogi lernilojn
kunlabore kun *edukado.net* kaj laŭ aliaj vojoj

Precipe la pliaj celoj povos facile kreski. La estraro starigis por si ankaŭ internajn celojn, sed pri tiuj ni ne diskutu nun. La listigitaj celoj formos la bazon por trijara laborplano, kiun la estraro devigas sin malnetigi ene de siaj unuaj cent tagoj kaj prezenti al la komitato post ĝia kunsido en Hago (26-30 novembro 2009). Ĝi plie aperigos laŭmonatan taskaron por la 12 monatoj ĝis aŭgusto 2010, el kiu tireblos kalendaro de ĉiujaraj taskoj kaj limdatoj por estonta gvido. Ĉi tiuj dokumentoj estos publike rigardeblaj kaj regule ĝisdatigataj. Por scii pri la laboroj kaj por engaĝiĝi en ilin, vizitu regule nian ligan hejmpaĝon: *www.ilei.info*. Fariĝu komisiona kunlaboranto, aktivu en via sekcio, kontribuu al IPR, partoprenu trejnkursojn... Abundas ebloj aktiviĝi. Tiel, ni kune sukcesos!

Stefan MACGILL, Prezidanto de ILEI

Pri la 42-a Konferenco...

Inaŭguraj vortoj de la Prezidanto

Estimata sinjoro Rektoro, Karaj konferencanoj kaj gastoj,
Per la 42-a konferenco de ILEI ni notas la 60-jariĝon de nia organizo kaj omaĝas al la 150-a naskiĝdatreveno de Zamenhof, ligante la du jubileojn al la pasintjara sesdekjariĝo de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj. Ĉi



tiu simbole grava koincido de datrevenoj emfazas la packulturan agadon de ILEI por kaj per la Internacia Lingvo de D-ro Zamenhof subtene al la homaj rajtoj, precipe en la sferoj de kulturo, edukado kaj komunikado. Ni kontribuas niajn kolonojn kaj nian pavimon al konstruado de pacaj pontoj inter la popoloj apogante nian laboron sur pedagogiaj kaj etikaj valoroj de Esperanto. Nia agadkampo estas la pedagogio de E-o. Kaj tiu pedagogio dum la tuta historio de E-o, des pli dum la historio de ILEI, estas inter-

kultura pedagogio. Se ni perceptas la pedagogion kiel teorion kaj arton de edukado, tiam la pedagogion de E-o, la pedagogion de ILEI, ni povas kompreni kiel teorion kaj praktikon de edukado al kaj per E-o kaj ĝiaj aplikoj subtene al paca kunvivado kaj interagado en diverseco.

En ĉi tiu konferenco ni diskutas pri la Esperanta pedagogio antaŭ la defioj de interkultura komunikado. Tio ne estas nova temo nek nova tasko de ILEI, sed ĝi fariĝas ĉiam pli aktuala. Fronte al ĉiamaj kaj ĉiam pliaj defioj de la socia diverseco, homara evoluo kaj teknologia progreso, ILEI kreis kaj plu kreas trezoron de E-kulturaj valoroj kaj pedagogiaj rezultoj. Multaj estas la nomoj de la agantoj de ILEI kiuj enskribiĝis en la historion de E-o kiel kreantoj de ĝia daŭropovo. La rezultoj de lernejoj eksperimentoj kaj E-pedagogiaj konferencoj notitaj en la 60-jara historio de ILEI daŭre estas fonto de inspiro por novaj ideoj, esploroj kaj agadoj. La *Internacia Pedagogia Revuo* de ILEI estas gvida faka revuo de Esperantujo, kaj *Juna amiko* estas ĝia kultura kaj pedagogia perlo.

La konferencoj de ILEI estas ne nur loko kie renkontiĝas esperantistaj pedagogoj por interŝanĝi siajn fakajn spertojn kaj ideojn, sed ankaŭ malfermita pordo tra kiu ĉiam pli fluas kunlabora interŝanĝo inter la kulturo de E-o kaj aliaj kulturoj el kaj inter kiuj ĝi kreiĝis kaj daŭropove evoluas. Kaj ĝuste tiu interkultura malfermiĝo kaj rekonsidero de stereotipaj perceptoj de Esperantujo kiel laŭaksioma interkulturajo apartenas al akutaj defioj antaŭ la E-pedagogio. Malfermiteco por kunlabora interŝanĝo kaj reciproka kompreno de diversaj bezonoj, vidpunktoj

kaj agadperspektivoj kun neesperantistaj institucioj kia estas WSZiB – nia ĉi-jara gastiganto de la konferenco – donas al ni la eblon pruvi kaj ĉiam plu evoluigi la vivantecon kaj praktikan valoron de E-o kaj ĝiaj pedagogiaj kaj etikaj principoj.

Legante en la Konferenca libro resumojn de altrangaj prelegoj, seminarioj kaj laborsesioj kiujn ni havos dum la konferenco, mi ĝojas konstati, ke ni renkontas niajn defiojn kun konsiderindaj potencialoj promesantaj bonan evoluon. Dankon pro tio al ĉiuj kontribuantoj.

Mi dankas ankaŭ al nia diligenta organiza teamo kiu normale devis solvi multajn organizajn problemojn, pri kiuj nur ili scias, kaj ni scios nur pri la bona rezulto de ilia laboro kiun ni ĝuos dum la konferenca semajno.

Dankon al ĉi tiu altlernejo, kiu donis al ni kolegan helpon kaj ebligis bonajn organizajn kaj teknikajn kondiĉojn. Dankon al la altaj protektantoj kaj honoraj patronoj pro ilia rekono kaj subteno.

Dezirante al vi bonan konferencan laboron kaj agrablan semajnon en la mirinda Krakovo, mi proklamas la konferencon malfermita.

Radojica PETROVIĆ

Komitato kaj nova estraro en Krakovo

La Komitato kunsidis tra merkredo, julio 22, kun mallonga sesio aldonita en la ferma vendredo kadre de la asembleo. La Komitato merkred-matene:

- Petis neraportintajn komisionojn tion fari ene de 30 tagoj.
- Aprobis ekzamenan regularon por blinduloj, kiun ankaŭ akceptis la Komitato de UEA en UK.
- Akceptis la raportojn pri 2008 kaj senŝarĝigis la antaŭan estraron.
- Akceptis unu el la tri kandidatoj kiuj celis plue prezenti sin post du-mandata servado.
- Elektis novan estraron, kiel prezentite sur la interna kovrilpaĝo.

Je tiu punkto la komitato devis paŭzi du horojn, por ke la nova estraro havu tempon kunsidi. Rekunveninte ekde la 16a horo ĝi:

- Akceptis la celaron por 2009-2012, kiun la nova estraro ĵus ellaboris.
- Rajtigis la ĝisnunan kasiston daŭre administri la kontojn en Svedio sub gvido de la nova kasisto.

- Konsentis ke Ulla LUIN kiel kaskontrolanto plue helpu en la kontrolo de la sveda parto de la kontaro, kun aldono de tria ano al la kontrol-komisiono.
- Decidis ke la abontarifoj por *Juna amiko* restu ĉe la nunaj niveloj ankoraŭ en 2010, kun altigo de la enspezoj per blokaj mendoj de interkulturaj kaj similaj projektoj.
- Konsentis, ke IPR plue aperu ĝis la jarfino kun koloraj kovriloj.

En vendredo, 24 julio, la komitato estis kunvokita kadre de la asembleo.

Ĝi:

- Reakceptis kiel asembleo la ligajn celojn por la periodo 2009-2012 (*vidu la ĉefartikolon – NdlR*)
- Akceptis la indikan buĝeton por 2010, kiun ellaboris la nova estraro kun la ĝisnuna kasisto. Vidu ĝin en la hejmpaĝo.
- Decidis ke la plena membro-kotizo restos senŝanĝa por 2010 (sen voĉdono).
- Akceptis ke la reta abono por 2010 estu 4 EUR por B-landoj kaj 8 EUR por A-landoj.
- Konsentis pri la starigo de nova komisiono pri universitata kaj scienca agado, sub gvido de Duncan CHARTERS, kun fondo-membroj Radojica PETROVIĆ (RS), Ilona KOUTNY (PL), Aida ČIŽIKAITĖ (LT) kaj Kristin TYTGAT (BE), kun la rajto aldoni novajn membrojn kaj arigi kunlaborantojn.
- Decidis ke la komisiono pri lerneja agado estos gvidata de Julián HERNÁNDEZ, kun aldono de membroj Marija JERKOVIĆ (HR) kaj Jacqueline POUX (FR).
- Konsentis ke la elekto-komisiono pluoficu unu plian jaron, kaj estonte estu rekonsistigita unu jaron post la estraraj elektoj.

La koncentriĝo de ĉiu kunsido en unu tago pruviĝis tre malkonvena, precipe por elekto-jaro. Ĝi devigis la Komitaton ne atingi la duan duonon de la tagordo pri la estonta planado, krom pere de ĝenerala diskuto de la nova celaro. La merkreda posttagmezo estis grandparte perdita, ĉar la nova estraro nepre devis kunsidi pli frue ol la komitato povis utile plulabori. En estontaj konferencoj nepre okazos almenaŭ du kunsidoj, unu frue, unu fine, por ke komitatanoj kaj konferencanoj povu labori intense pri specifaj projektoj tra la konferenco. La komenca kunsido kunvokos komisionojn kaj starigos surlokajn laborgrupojn kaj difinos taskojn – la lasta kunsido aŭdos la rezultojn kaj planos la pluirajn vojojn.

Pri la ekzamena komisiono

La raporto por 2008 de la ekzamena komisiono estis akceptita kun danko en la komitatkunsidoj en Krakovo. Elstara atingo de la jaro estis la aperigo de la tria eldono de la gvidilo por la ekzamenoj, tuj antaŭ la roterdama UK. Ses sesioj estis planitaj kaj kvin el ili liveris sukcesintojn, rimarkinde kvar el la kvin okazis ekster Eŭropo. Julie okazis sesioj en Montrealo, Kanado, kun 3 sukcesintoj, en la UK kun 13 sukcesintoj, kaj en Portonovo, Benino, en la ILEI-konferenco kun 3 sukcesintoj. En aŭgusto okazis sesio en Vatomandry, Madagaskaro, kun 3 sukcesintoj, kaj en decembro kvin sukcesis en Hashtgerd, Irano. Prezenti sin 52 kandidatoj, el kiuj 27 sukcesis, 13 je la meza nivelo kaj 14 je la elementa nivelo. Fine de 2008 estis 111 rajtigataj ekzamenantoj. Legu la plenan raporton ĉe: http://www.ilei.info/novajxoj/Jarraporto_ekzamena_2008.pdf. smg

Impresoj pri Krakovo, 2009

de **Duncan CHARTERS**, vicprezidanto de ILEI

Kvankam mi jam servis al ILEI en diversaj roloj, pro profesiaj kaj familiaj kialoj mi ĝis nun nur okaze povis partopreni en konferencoj de la Ligo. Kiel do impresis min la Krakova konferenco kompare kun antaŭaj?

Unue, organizado. Post anonco de mia intenco ĉeesti, estrarano pri konferencoj Aida ĈIŽIKAITĖ kaj LKK-prezidanto Małgosia KOMARNICKA estis en daŭra kontakto por aranĝi pri prezentadoj, peti necesajn informojn, atentigi ĝentile pri datlimoj, fari kaj respondi demandojn, kun granda dediĉo ĉiam kuraĝigante kaj aranĝante ĉion por loĝado. Eĉ atendis min taksio ĉe la flughaveno, kaj ili nature ĉiam restis atentaj por dumkonferencaj bezonoj. Mi ekkonsciis kiom profesiiĝis la konferenca aranĝado en la lastaj jaroj malgraŭ tio, ke la tuto dependas de volontula laboro.

Frue alvenintaj por adaptiĝi al la Eŭropa horzono, kelkaj el ni ekvojaĝintoj el Usono ĝuis la belan centran placon de Krakovo kaj fruan vespermanĝadon kun LKK en kelo, mezepoka malliberejo, kiu post kelkaj



tagoj servis kiel nia bankedejo. Okaze de nia dua vizito ni ĝuis la sperton manĝi unue en la kelo akompanate de belvoĉa pola kantisto-muzikisto, kiu regalis nin per kantoj en la pola kaj en E-o. Poste, ni transiris kun malsamaj manĝkunuloj por tipe polaj ĉefmanĝo kaj deserto en la kontrasta liberaera etoso de la restoracia ĝardeno. Unika kaj sukcesa aranĝo kiu ebligis diversecon de memorindaj konversacioj kun novaj kaj malnovaj amikoj.

Krakovo fieras aserti sin la urbo plej histoririĉa de Pollando. La ekskursprogramo profitis de la scioj de lokaj aktivuloj, inkluzive de seminaria instruisto Lidia LIGEŖZA, kies du verkoj en E-o pri la Krakova regiono estis aĉetebraj, kaj proponis abundan varion de vizitoj, de kultura konatiĝo kun la urbo ĝis memorigo pri la okazintaĵoj en la koncentrejo Oświęcim. Aparte elstara programo por konferencanoj kiuj deziris profiti la okazon samtempe ferii kaj edukiĝi pri novaj regiono kaj kulturo, kvankam la allogo de la ekskursprogramo signifis ke foje, kaj aparte dum unu tago, la konferenca programo mem apenaŭ altiris ĉeestantojn. Ĉiam malfacila dilemo, oferti abundajn elektojn kiuj tamen permesas subteni ĉiujn programerojn. Kun pli da ĉeestantoj, kompreneble, tiu problemo mildiĝus aŭ malaperus, kvankam efektive partoprenis ĉi-jare pli ol 80 personoj entute en eĉ duoble pli da individuaj programeroj (laŭ prezentintaj individuoj): evoluo kiu montras kreskantan apogon de la konferencoj kaj pliriĉiĝon de ilia enhavo.

Nin gastigis kaj bonvenigis la Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo en Krakovo, WSZiB, kiu provizis per ĉio necesa por la konferenca programo inkluzive teknikan subtenon kaj helpantojn (www.wszib.edu.pl). Kvankam programoj, manĝoj kaj loĝado okazis en kvin malsamaj konstruaĵoj de lokaj universitatoj, ĉiuj estis relative proksimaj kaj kvankam ne tiel oportune kiel se ĉio okazus samloke, tamen la ĉefvoja trafiko, distanco kaj vetero ne prezentis por la aranĝo nesupereblajn obstaklojn. Ni estis inter studentoj kaj konatiĝis kun iliaj loĝejoj, manĝejoj, kaj klasejoj. Ni ĉefmanĝis samtempe kun studentoj en programo celanta lernadon de la pola lingvo, do la junaj gekelneroj insistis paroli pollingve por ke ankaŭ ni devu elturniĝi (ni se eble zorgis esti ĉe tablo kun almenaŭ unu pola kunulo por ekscii kiun pladon elekti, kaj ne dependi nur de diveno aŭ hazardo, aŭ elektemo de la kelnero!). Por tiuj, kiuj ne manĝis kune, estis aliaj ebloj, kaj pluraj kontribuis dum la semajno trinkaĵojn kaj manĝaĵojn por la kafpaŭzoj. Tion mi ne spertis antaŭe, sed mi scias ke kostoj de tia servado en hoteloj aŭ de eksteraj provizantoj estas timige altaj, do interesa solvo por malpliigi la

konferencajn kostojn: antaŭe oni petis ke ni alportu taŭgajn manĝetojn por tio kaj por la interkona vespero, tiel aldonante alikulturajn frandaĵojn al kutima trinkrutino.

Ni profitis nian ĉeestadon inter studentoj organizante en klas-konstruaĵo Lingvan Festivalon sub gvido de nia ĉefa spertulo pri tiaj aranĝoj, Dennis KEEFE, kaj koncerton. Ĉeestantoj povis lerni diversajn lingvojn inkluzive E-on. En la posta tago la urbocentra kulturdomo kun kiu kunlaboris Maria MAJERCZAK, organizis en la urbo ekster la konferenco similan „Nokton de Lingvoj kaj Kulturoj”, profitante partoprenon de niaj jam spertaj instruistoj, kun aldona prelego de loka universitata spertulo pri la pola kulturo en la tempo de Zamenhof, kaj fine vigla kaj partopreniga multlingva koncerto de JoMo. Ankaŭ tie aperis publiko interesita pri lingvoj, E-o kaj la koncerto. Krome, okazo por vidi alian parton de la urbocentro. Aparte kaptis mian atenton kelkaj vere unikaj publikaj prezentaĵoj de polaj gejunuloj (almenaŭ de mi neniam antaŭe viditaj) sur apuda granda placo. Neatendita ekstra kultura surprizo!

Antaŭ la konferenco, en diskutlisto leviĝis la demando ĉu aliĝantoj al konferencoj de ILEI ĉefe interesiĝas pri feriado kaj kunbabilado kaj ne tiom pri profesiaj temoj rilatantaj al la instruado de E-o. Do mi estis preta aparte atenti tiun demandon dum la ĉi-jara konferenco. Kaj jes, almenaŭ unu konferencano komentis ke ankoraŭ ŝajnas al li tiel. Kaj pensante pri la kvin ekskursoj, la variaj distraj vesperaj aranĝoj, la ebloj ĝui la ĉirkaŭaĵon, mi konfirmis, ke tiu elemento certe povas esti la plej forta por feriea konferencano. Abundaj ludoj, diversnacia muziko, deklamado, teatro, diverskultura manĝado kaj trinkado, interagaj ridigaj ekzercoj inkluzive la „aligatorejon”, kie ni povis konstati la malfacilaĵon komunikiĝi per komuna negepatra lingvo alia ol E-o. Jes, la unua parto de la ofte ripetita reklam-slogano „Ambaŭ: amuzo kaj scienco” evidente plenumita!

Tamen kio pri la dua? Ĉu lamis la scienco? Nu, kompare kun la relative malmultaj organizitaj prezentaĵoj kiujn mi memoris de antaŭa konferenco, ni alvenis al ĝuste alia ekstremo! Multe pli ol cent prezentaĵoj pri profesiaj temoj rilatantaj aŭ al la instruado de E-o, al edukado ĝenerale, aŭ edukado en Pollando, specifaj temoj pri kulturo, literaturo kaj teknologio. Tuttaga simpozio pri la konferenca temo, la pedagogio de E-o antaŭ la defioj de interkultura komunikado, kun sep partoprenantaj polaj universitatanoj inkluzive neesperantistojn. Dua renkontiĝo de universitataj instruistoj kiuj daŭrigis la pasintjarajn Amsterdamajn diskutojn pri la

instruado de E-o kaj interlingvistiko je universitata nivelo, kun specifa atento al projektoj, kunlaborado kaj interŝanĝoj.

Por mi persone, okazis pluraj signifoplenaj aferoj. Unue, mi informiĝis pli detale pri gravaj programoj kiel tiu de la Universitato Adam Miczkiewicz en Poznano, kiu interalie profesie preparas instruistojn de E-o, kaj tiu de la kulturcentro en Herzberg, Germanio, kie la pedagogio estas ankaŭ kerna en multaj aranĝoj kiujn ili organizas tra la jaro. Due, mi povis plivastigi miajn sciojn eĉ en kampoj kiujn mi konas. Aparte interese estis informiĝi pri la neĉeestaj lernprogramoj de AIS, Akademio Internacia de la Sciencoj, kiu unuafoje partoprenis en la konferenco per prelegoj kaj aŭspiciado de seminarioj por kiuj partoprenantoj povis ekzameniĝi kaj ricevi AIS-atestilon pri partopreno. Unu el la seminarioj estis pri temo esenca por esperantistoj kaj aparte instruantoj de la lingvo, Interkultura Komunikado, prezentita de Kristin TYTGAT. Okazis seminario pri literaturo, serio da lecionoj pri la pola lingvo, plej diversaj prezentaĵoj inkluzive de Radojica PETROVIĆ pri la evoluo de E-o en DR Kongo kaj la interesiĝo starigi programon por prepari instruistojn de E-o en la pedagogia universitato de Kinŝaso. Mi mem havis la okazon ne nur prelegi pri la instruado de universalaj etikaj valoroj en lingvoklasoj kaj aparte en E-o, sed ankaŭ dum ses seminariaj sesioj doni panoramon pri la nuntempa uzado de la teknologio en la lingvoinstruado: mi klarigis kial ni tion atentu kiel gravan elementon en la sukcesigo de instruado de E-o en ĉeestaj klasoj kaj per neĉeesta lernado. Tiel abundis la elektoj, ke grava problemo por kelkaj estis konfliktoj inter programeroj. Ekzemple, mi ne povis ĉeesti la trian seminarion pri interkultura komunikado, ĉar ĝi okazis samtempe kun unu el miaj seminarioj pri teknologio, kaj ankaŭ kun kunsido de la Komitato de ILEI!

Ĉeestantoj de profesiaj konferencoj konas tro bone la problemon elekti, kiam okazas konfliktoj inter sesioj, kaj eĉ estas bone, ke ni fine spertas tion ankaŭ en niaj konferencoj. Necesos nun, tamen, atenti ke ni proponu maksimumajn eblojn por kontentigi ĉies bezonojn kaj dezirojn sen forpreni publikon de vere esencaj temoj, kiuj estas efike trakteblaj nur en konferenca sesio. Kiam mi ĉeestis la seminariojn pri interkultura komunikado, mi kun ĝojo pensis, ĝuste tion ni devis havi jam antaŭ longa tempo, kaj efektive tio estu esenca parto de ĉiuj konferencoj. Eble en tiaj kazoj povas enprogramiĝi unu ĝenerala prezento por ĉiuj, kaj poste sekvu tiurilataj seminarioj por tiuj, kiuj deziras fondiĝi kaj spertiĝi per praktikaj ekzercoj aldone al diskutado. Mi ĉiam memoros la seniluziigon de

observanto de UK antaŭ jaroj, kiu demandadis al multaj, kiel vi trejnas viajn laborantojn pri interkultura komunikado? Li tro ofte aŭdis la respondon “Ni ne bezonas tion, ĉar ni ĉiuj parolas komunan neŭtralan lingvon kaj havas similajn idealojn”. Ĉu ni vere estas kulture konsciaj? Kapablaj funkcii interkulture en kaj ekster E-o? Ĉu ni estas pretaj inteligente paroli pri tiu aspekto de la komunikado kun interesitaj sed eble skeptikaj specialistoj?

Ĉu tamen estis mankoj? Nu, se iu dirus ke ne, tiu ne konas la homojn kaj aparte ne la esperantistojn! Por profiti de kritikoj, tamen, efektive gravas ke ne nur kelkaj personoj esprimu siajn opiniojn kaj rekomendojn, ĉar okazas ke kio estas bona por unu persono ofte ne funkcias por alia. Se mi farus rekomendojn, temus pri pliproksimigo al idealo ol tuta forĵeto de tio jam farita. Programo tro ambicia? Jes, kvankam ĉi-jare la organizantoj povis ekspluati kondiĉojn, kiuj denove permesis inviti lokajn universitatojn por partopreni en la jam kutima tuttaga seminario, okazigi la duan renkontiĝon de universitatoj, organizi seminariojn kaj prezentaĵojn de aparte kompetentaj kolegoj, aldoni partoprenon de AIS, kaj havi plurajn ekskursojn al vere signifoplenaj lokoj. Sentiĝis manko de diskutado post kelkaj prelegoj, kaj efektive foje okazis malpli da diskutado ol estus dezirinde. Por multaj konferencanoj okazas kontentiga lernado aŭskulte, por aliaj pli efikas se okazas interagado kun la koncernaj spertuloj kaj kun la aliaj partoprenantoj. Eble oni povus parte kompensi tion organizante tempon por diskutado kun interesitoj je elektebla horo tuj post prelego, aŭ dum baldaŭ sekvonta manĝo. Kio ankaŭ povus solvi la problemon pri manko de organizitaj okazoj por profunde diskuti kun kolegoj specifajn temojn pri pedagogio. Veraj trejnoseminarioj pri instrutemoj inkluzive gramatikon povus efiki, ĉar ne ĉiuj povas ĉeesti porinstruajn programojn ekster sia hejmurbo kaj ne ofte povas esti kun spertaj instruistoj de la lingvo. Lingvokliniko por respondi demandojn. Paneloj por ĝeneralaj demandoj al spertaj pedagogoj. Programo kun kvinminutaj prezentaĵoj de unu instrutekniko por partoprenantoj kiuj ne havas sufiĉon por tuthora prezentaĵo. Specifaj legaĵoj por antaŭa preparado de konferencanoj interesitaj pri aparta temo, aŭ eĉ antaŭkonferencaj atelieroj organizeblaj kunlige kun interkonferenca lernado dum la jaro. Ne mankas ideoj, kaj ni aŭdu viajn! Resume, tamen, mi nur diru, ke mi senhezite planas ĉeesti la venontan konferencon en Matanzas, Kubo. Mi certas ke mi havos la okazon konatiĝi kun nova lando, aparte interesa por mi, ĝui kunestadon kun inteligentaj kaj agrablaj kolegoj, lerni pli por

plifortigi miajn profesiajn sciojn kaj kapablojn instrui E-on, ricevi kaj doni en etoso de respekto kaj antaŭĝuo de ĉiu tago. En neniu alia unusemajna kunteksto mi povus proksimiĝi al la unika valoro de tiu kombino. Jes, la konferencoj de ILEI fariĝas ĉiam pli vizitindaj, do konsideru aliĝi kiam vi faros viajn venontajn vojaĝplanojn!

Pro tio ke la supraj komentoj estas subjektivaj impresoj, mi invitas vin kompletigi la bildon vizitante la hejmpaĝon de ILEI, kie troviĝas kelkaj opinioj de partoprenantoj, detala raporto de Aida ČIŽIKAITĖ pri la konferenco, kaj ankaŭ elektronika versio de la konferenca libro. Kvankam tio ne povas anstataŭi ĉeeston, vi certe ekhavos tre kompletan ideon pri la nuna amplekso de niaj konferencoj!

Resuma raporto pri la 42-a ILEI-Konferenco

de Aida ČIŽIKAITĖ, eksestrarano pri konferencoj,
scienca kaj universitata agado

La 42-a ILEI-Konferenco okazis de la 17-a ĝis la 25-a de julio 2009 en Krakovo, Pollando.

La jaro 2009 estas jubilea jaro por ILEI — la organizo festas sian 60-jariĝon. Estis ankaŭ pliaj jubileoj: la 150-a jaro post la naskiĝo de L. L. Zamenhof estis emfazita per la konferenca temo *La pedagogio de E-o antaŭ la defioj de interkultura komunikado*, kunlabore kun UEA pri la temo de la UK *Krei pacan ponton inter la popoloj: Zamenhof hodiaŭ*. Ankoraŭ du jubileoj, la 100-jariĝo de I. Lapenna kaj la 85-jariĝo de I. Szerdahelyi (prezidanto de ILEI de 1985 ĝis 1987) estis emfazitaj per la nomoj de salonoj kaj festaj prelegoj pri niaj famaj samideanoj de Ilona KOUTNY (PL) *Loke kaj fake, internacie kaj home: 85-jara datreveno de István Szerdahelyi* kaj Josip PLEADIN (HR) *Ivo Lapenna – konstruinto de la moderna E-movado*.

La konferenco havis multajn subtenantojn, kiel oni povas konstati en la konferenca libro, videbla en la retpaĝaro de ILEI kaj en la plena raporto tie legebla.

Al la konferenco aliĝis kaj partoprenis pli ol 80 personoj el 28 landoj (Pollando – 15, Italio – 6, Germanio kaj Kroatio po 5, Finnlando, Hispanio kaj Ukrainio po 4 (1 el Ukrainio ne venis), Belgio, Hungario,

Japanio, Meksiko, Svedio kaj Usono po 3, Aŭstralio, Britio, Ĉinio, Francio, Kubo, Svislando po 2, Bulgario, Ĉeĥio, Israelo, Litovio, Nederlando, Rumanio, Serbio, Slovakio po 1) kaj po 2 nealiĝintaj el Ukrainio kaj Pollando. Fojfoje en la konferenco aperis ankaŭ helpantoj – ekzemple familioj de Hawlena-Krzemińscy kaj Kuźmiccy, du junuloj Robert Kołodziej kaj Mateusz Kania: sed tiuj helpantoj apenaŭ havis eblon profiti de la programo, ĉar plejparte ili nur kuris tien kaj reen plenumante diversajn taskojn. Grażyna Porada aranĝis por ni la mankantan libroservon kaj nur por la Fermo povis veni Edward Malewicz. Dankon al ili kaj al ĉiuj aliaj.

La konferenco okazis en la Supera Lernejo pri Bankismo kaj Direktado (WSZiB), kie ni havis tre bonajn kondiĉojn por konferenci, eblis uzi ĉian modernan teknikon, atingi samideanojn, kiuj estis for de Krakovo kaj skajpkonferenci kun ili (pliaj informoj pri WSZiB en www.wszib.edu.pl en la pola kaj la angla).

En la Malfermo partoprenis la Ĝenerala sekretario de UEA Barbara PIETRZAK, kiu salutis la konferencon nome de la UEA-estraro, kaj krome laŭtlegis mesaĝon de Claude NOURMONT, vicprezidanto de UEA kaj estrarano pri kulturo kaj edukado. Nin honoris ankaŭ la rektoro de WSZiB prof. Włodzimierz ROSZCZYNIAŁSKI, kiu alparolis la konferencanojn en E-o. Salutvortoj de pluraj organizaĵoj aperas en la konferenca libro.

La nuna jaro estis ankaŭ elektojaro, do okazis ne nur Komitatkunsido en kiu estis elektita nova estraro de ILEI, ankaŭ kunsidis la ĵus elektita estraro. Pri la decidoj la partoprenantoj estis informitaj dum la Ĝenerala Asembleo antaŭ la Solena Fermo.

La programo de la konferenco estis tre riĉa, abunda, ambicia kaj, mi eĉ aŭdacus diri, vere bonkvalita kaj altvalora. Entute okazis 124 programeroj, sen kalkuli, ke la Simpozio konsistis el 19 eroj, la Lingva Festivalo el 15 eroj, krom ankaŭ 6 sesioj de komitatkunsido kaj 4 de estrarkunsido. Okazis jam kutimaj programeroj de ILEI-konferencoj, sed estis ankaŭ io nova. Dum la Interkona (manĝ)vespero ĉiu alveninto mallonge prezentis sin, sian landon kaj la alportitan frandaĵon. Poste ĉiuj gustumis, interparolis en amika neformala kunesto kaj gaja etoso – vere ekkonatiĝis, se ili ne ankoraŭ estis konataj.

Dum la konferenca semajno okazis prelegoj kaj kelkaj seminarioj, aranĝitaj en blokoj kaj paralele en tri klasĉambroj senĉese dum „labortagoj“: *La rolo de la nuntempa teknologio en la lingvoakirado* (6-foje) gvidis Duncan CHARTERS (US); *E-literaturo* (6-foje) gvidis Lidia LIGEŖZA

(PL); *Rolludoj* (4-foje gvidis Stefan MACGILL (HU)); *Lingvaj ludoj* (3-foje) gvidis Ana MONTESINOS DE GOMIS (GB); *Interkultura komunikado* (3-foje) gvidis Kristin TYTGAT (BE); *E-o laŭ rekta metodo* (2-foje) gvidis Stano MARČEK (SK). Al seminarioj iom similis *Poezia metiejo* (6-foje) gvidita de Lidia LIGEZA kaj Adam ŁOMNICKI (PL), prelegseriojn *La pola eksprese* (6-foje) gvidis Magdalena TATARA (PL) kaj *Ekkonu Pollandon* (6-foje) gvidis Małgosia KOMARNICKA kaj Piotr NOSEK (PL) – la lasta havis prelegojn kun titoloj: *Mallonge pri longa historio de Pollando* (gastparolanto Hans-Dietrich QUEDNAU), *Krakovo, la konferenca urbo – klaĉoj kaj legendoj* (gasto Lidia LIGEZA), *Pollando kian vi ne konas, Pollando per okuloj de eksterlandano* (gasto Augusto CASQUERO), *Polaj frandaĵoj kaj tradicioj* (gasto Irena CZECHOWSKA – mastrino de la bankedo), *Tio, kion vi volas scii, sed hontas demandi*.

Okazis kelkaj diskutrondoj: *Uzo de ludoj en kursa instruado de E-o* gvidis Michail LINECKIJ (UA), *Strategio por vera „neutrala“ multlingvismo* gvidis Michael CWIK (BE).

Aparte menciindas *Invito al sekvajara konferenco en Kubo* de Maritza GUTIÉRREZ GONZÁLEZ kaj Julián HERNÁNDEZ ANGULO (CU).

Simpozio ĉi-jare okazis jam la 5-an fojon kaj estis la plej ampleksa el ĉiuj ĝisnunaj. Ĝi daŭris dum tuta tago. La Simpozion gvidis Witold STEPNIEWSKI kaj Ilona KOUTNY. La ĉefprelegon *Eduksistemo en Pollando* faris Tomasz MALICKI (PL). Kunvenis sciencistoj el 11 universitatoj el Pollando, Italio, Japanio, Ukrainio kaj Usono; estis faritaj 18 prelegoj. La Simpozio finiĝis per vigla paneldiskuto pri la temoj de la prelegoj kaj konferenca temo ĝenerale.

Ĉi-jare ILEI plivastigis sian laboron kaj kunlaboron kadre de la konferenco. Dum la konferenco okazis ankaŭ sesio de AIS kaj dua Renkontiĝo de Universitataj Instruistoj (RUI), kiu daŭrigis la laboron komencitan pasintjare en la Amsterdama konferenco.

La duan Renkontiĝon de Universitataj Instruistoj gvidis Renato CORSETTI (IT). Komence estis revuitaj la atingoj dum unu jaro, poste sekvis du laborgrupoj – prelego kaj 3 laborsesioj: Ilona KOUTNY (PL) gvidis grupon pri *Universitata instruado de E-o kaj interlingvistiko* kaj Kristin TYTGAT (BE) pri *Universitataj kunlaboroj, interŝanĝoj kaj projektoj*. Dum la fina sesio estis faritaj konkludoj, resumo, starigo de laborplano.

Niaj gastoj – AIS – riĉigis la programon de la konferenco per siaj prelegoj kaj prelegoserioj: Hans-Dietrich QUEDNAU (DE) *Virtuala,*

distanca instruado; Alicja Urszula LEWANDERSKA-QUEDNAU (DE) *Rolo de E-o por resanigado de maljunuloj surbaze de kompensa pedagogio* (2-foje) kaj *Eksperimentoj el Hanau* (DE) kaj *Repty* (PL), *Dornach* (CH) (2-foje); Božidar LEONOV (BG) *Bazaj principoj de turismiko, religia kaj ekologia turismo* (3-foje). Ankaŭ kelkaj seminarioj de la ILEI-konferenco estis traktitaj kiel AIS-kursoj: entute estis enmanigitaj 18 atestiloj pri 7 kursoj.

Ni ne nur multe laboris – ni ankaŭ agrable pasigis la tempon dum ekskursoj kaj vespera programo. Okazis du tuttagaj ekskursoj al Zakopane kaj Wadowice, Kalwaria, Oświęcim, ankaŭ tri duontagaj: al la salminejo Wieliczka, Niepołomice kaj piede tra la konferenca urbo Krakovo. La ekskursojn gvidis la membroj de LKK Lidia LIGEZA, Piotr NOSEK [vd. la foton titolpaĝe – NdlR], Magdalena TATARA kaj Gosia NITKOWSKA.

Tre bunta kaj varia estis la kultura vespera programo. Dum la Nacia Vespero fama E-aktorino Anna RAMZA-KOZAK (PL) recitis pecetojn el „Sinjoro Tadeo“ de Adam Mickiewicz, kaj Joachim KOŁPANOWICZ (PL) belege ludis gitaron. Alian vesperon Jadwiga GIBCZYŃSKA (PL) prezentis monodramon laŭ la taglibreto de Ada SIKORSKA-FIGHIERA. Komunan kantadon gvidis Alan BISHOP (AU), Michail LINECKIJ (UA) kaj Julián HERNÁNDEZ ANGULO (CU). Ankaŭ dum la Bankedo okazis koncerto — Janusz GRZECZ (PL) prezentis polan kantatan poezion kaj tiun tagon ni finis per la Konferenca balo. La Aligatorejo estis programero, kiam ĉiuj partoprenantoj babilis nek en E-o, nek en sia denaska lingvo, sed en iu(j) alia(j) konata(j) lingvo(j) en malgranda(j) grupeto(j). Speciala kaj tre ampleksa estis programo de la Internacia Vespero. Ĝin komencis Stano MARČEK (SK) per *Ekspozicio de lernolibro en 20 lingvoj*. Sekvis *Lingva Festivalo* aranĝita de Dennis KEEFE (CN) – patro de LF. La kulturan parton komencis pranepino de A. Grabowski Natalia DOMBROWSKA (PL), kiu prezentis por ni sian programeron, per kiu ŝi gajnis la ĉefpremion en la konkurso „Alproksimigu la mondon“.

La *Lingva Festivalo* jam estas tradicia ero de ILEI-konferencoj. Tiamaniere ni dankas al la urbo, kiu invitas kaj gastigas nian konferencon. Ĝoje ni donacas al la urbanoj eblon konatiĝi kun pluraj lingvoj kaj kulturoj, ankaŭ konvinkiĝi pri la perfekta funkciado de E-o kiel lingvo-ponto.

En la programo ĉi-jare estis novaĵoj – rapidkurso de la loka (la pola) lingvo kaj prelegserio pri konferenca lando „*Ekkonu Pollandon*“ (ĉiuj realigitaj de membroj de LKK – estraranoj de la pola sekcio de ILEI). Espereble ankaŭ tiuj ĉi programeroj enradikiĝos kaj ili iĝos tradiciaj partoj

de ILEI-konferencoj. Alia novaĵo – metiejo (realigita de surlokaj, krakovaj esperantistoj). Estus bone ĉiujare havi iun metiejon por la konferencanoj. Espereble la poezia metiejo estos/as/is bona komenca paŝo.

Infanoj, junuloj, plenkreskuloj havas siajn IIK, IJK, UK, ILEI-konferencon, sed estus dezirinde revivigi la „*Gimnazon*“ por adoleskuloj dum la UK aŭ/kaj la ILEI-konferencoj por doni ankaŭ al ili ĝuindan programon.

Dum la Solena Fermo ni dankis al ĉiuj kunorganizantoj kaj helpantoj, ankaŭ al la laboristoj de la konferencujo, kiuj estis disponeblaj kaj helpemaj en ajna momento — ili ĉiuj ricevis simbolajn donacetojn. Aŭgusto CASQUERO DE LA CRUZ regalis nin per hispanmaniere pretigita vino kaj ni ĉiuj kune tostis en la fino de la konferenco, je la sano de la organizantoj kaj partoprenantoj, ankaŭ je la sukceso de sekvaj konferencoj.

Ni havis raportojn en la televido kaj radio de niaj amaskomunikilaj patronoj.

Ĉi-jare okazis unu aranĝo ekster la konferenca programo al kiu (aktive kaj pasive) estis invititaj ankaŭ la partoprenantoj de la konferenco. Temas pri la *Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj* organizita de la urba kulturdomo (ŜOK) kun kiu kunlaboris s-ino Marija MAJERCZAK. La partoprenantoj de la konferenco estis invititaj prezenti siajn lingvojn, babilu en diversaj lingvoj kun loĝantoj kaj turistoj, informi pri E-o. Okazis la koncerto de JoMo.

Ĝenerale, laŭ la opinioj de la partoprenantoj, la konferenco estis tre sukcesa kaj tre bona, unu el la plej bonaj dum la lastaj jaroj, eĉ eble tro riĉa kaj abunda, ĉar ne eblis samtempe ĉeesti en kelkaj programeroj, kiuj interesis. Tamen, ni havas la celon altiri 300 partoprenantojn, kiam 100 ekskursantoj ne malhelpas havi po 50 aŭskultantojn en ĉiuj 3-4 paralelaj programeroj. Por tio necesas teni same bonan nivelon de fakaj programeroj, havi interesajn ekskursojn kaj varian vesperan (kulturan kaj distran) programon, bonajn loĝkondiĉojn, manĝojn kaj ne grandajn prezojn por ĉio tio, pri kio ĝis nun ni, ŝajne, sukcesis.

Ni invitas ĉiujn partopreni en la sekvaj konferencoj de ILEI, kie vi konvinkiĝos, ke

ILEI-KONFERENCO – AMBAŬ: AMUZO KAJ SCIENCO!

sed ni avertas, ke tio danĝeras – vi ne plu povos imagi vian esperantumadon sen partopreni la konferencon de ILEI kaj rezisti ne plu eblos (ĉu vi memoras ŝercon en reklamo: „Jam gustuminte, ne plu eblas halti.....”).

Kaj ni certe ankoraŭ pli kaj pli plibonigos ilin ☺.

Mi kaptas la okazon ankoraŭfoje danki al LKK, al la helpantoj kaj ĉiuj partoprenantoj, kiuj per pretigo de bonegaj programeroj kaj simpla partopreno kontribuis al la sukceso de la 42-a ILEI-konferenco en Krakovo. Mi bondeziras sukceson al la organizantoj de la sekvaj konferencoj kaj tutkore invitas ĉiujn daŭre kunlabori kaj aktive partopreni. Mi ankaŭ pardonpetas, se organizante kelkajn lastjarajn konferencojn ion mi mistrafis kaj ies atendoj ne estis plenumitaj. Bonvolu sendi viajn pritaksojn, komentojn, rimarkojn, opiniojn, raportojn por konsidero de la nuna estraro. Dankon pro la kunlaboro!

LF kaj Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj en Krakovo *sed KIEL altiri la publikon al niaj lingvaj eventoj?*

de **Dennis KEEFE**, *Universitato de Nankino, Ĉinujo*

Dum la ILEI-Konferenco de Krakovo, la 23-an kaj 24-an de julio, okazis du specoj de lingvaj eventoj: la tradicia, tamen malgranda, *Lingva Festivalo (LF)* kun 18 lingvoj, kaj la nova *Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj* kun eble 8 lingvoj kaj posta koncerto de JoMo.

Kiel kutime, ĉi tiuj du lingvaj eventoj prezentis mallongajn kursetojn dum periodo de nur duonhoro. Por la enhavo, la lingvo-prezentantoj komence donis iom da fona informo pri la lingvo, ekzemple, kie ĝi estas parolata kaj al kiuj lingvoj ĝi rilatas.

Dum la kursetoj, la prezentantoj ofte instruis kiel diri kelkajn simplajn frazojn kiel *Saluton! Kiel vi nomiĝas? Kaj Mi amas vin!* Ankaŭ instruiĝis kelkaj gramatikaj punktoj, vortoj, prononcmannerio kaj tiel plu.

Por la *LF*, la lingvoj kun prezentantoj inkluzivis la anglan de Aŭstralio kun Alan kaj Jennifer BISHOP, la kroatan kun Marija JERKOVIĆ, la hungaran kun Zsófia KÓRÓDY, la francan kun Elisabeth BARBAY, la germanan kun Irmgard SCHNEIDER, la ukrainan kun Nina DANILJUK, la italan kun Anna LÖWENSTEIN kaj Renato CORSETTI, la finnan kun Harri LAINE, la slovakon kun Stano MARČEK, la japanan kun Tiekio ISIKAWA kaj Kimie MARKARIAN, Esperanton kun Mikaelo LINECKIJ kaj Iván BUJDOSÓ, la hebrean kun Amri WANDEL, la rumanan kun Mihai TRIFOI, la hispanan kun Augusto CASQUERO, la nederlandan kun Simon SMITS kaj Kristin TYTGAT, la baŝkiran kun Gulsesek, kaj la tataran kun Alina SHLYAKHOVA.

Kelkaj el la prezentantoj de kursetoj dum la tradicia *LF* prezentis siajn lingvojn ankaŭ en la sekva tago por la *Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj*, kiu okazis en la kultura centro de la urbo Krakovo. La *Nokto de Lingvoj* altiris pli da ekstera publiko, parte pro la pli bona surloka anoncado, la centra loko, kaj la kunligita koncerto de JoMo.

Aparta allogaĵo de la *Nokto de Lingvoj* estis la aligatorejo, kie okazis, samtempe, konversacioj en pluraj lingvoj. Ĉe unu tablo estis la hispana, ĉe alia la franca, la japana, la slovaka kaj tiel plu. Iom da lingva kaoso kiu similas *Kafejon de Lingvoj*.

Tiuj novaj ideoj devenas de Marija MAJERCZAK, kiu sukcesis starigi la *Nokton de Lingvoj kaj Kulturoj*.



Iván BUJDOSÓ, prezentanta E-on dum Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj

Rilate al statistikoj, la *LF* altiris nur 35 personojn en la sesio je la 19:30; 47 je la 20:00; kaj 54 je la 20:30. La nombroj da ĉeestantoj por la *Nokto de Lingvoj kaj Kulturoj* estis iom pli malaltaj, sed la elcento da publika

ĉeestado estis pli alta. Krom lingvaj ĉeestantoj, alvenis al la koncerto de JoMo eble 70 aŭ 80 ĉeestantoj.

Kvankam la du lingvaj eventoj de Krakovo altiris multe pli da publiko ol la *LF-oj* de Italio kaj Japanio de 2006 kaj 2007, ili tute ne kompareblas kun la kutima publika sukceso de *Lingvaj Festivaloj* en aliaj landoj. En Krakovo entute alvenis eble 20 neesperantistoj por partopreni kursetojn. Eĉ al la unua *LF* de la urbo Tours en Francio, kiu estis la malplej ĉeestata *LF* de mia kariero, alvenis pli ol 700 kursaj ĉeestantoj, kaj dekoj da ili sekvis postajn lingvajn kursojn. Kial, do, la *LF-oj* de Italio, Japanio kaj nun Pollando, tiurilate tiel malsukcesis? Tutsimple ĉar la starigo de lingvaj kursetoj estas *organiza* laboro, dum la altiro de ekstera publiko estas *merkataka* laboro.

Eblas starigi “perfektan” *LF-on* kun bonaj instruistoj, multe da lingvoj, agrabla etoso kaj tiel plu, sed tio ne signifas, ke la publiko alvenos aŭtomate. Eĉ bone verkita broŝuro pri la festivalo, detala amaskomunikildosiero kaj belaj afiŝoj ne efikos, se oni ne bone pripensas kampanjon por altiri la lokan publikon. Sed el kio povas konsisti sukcesa kampanjo?

Sukcesa kampanjo por venigi ĉeestantojn de *LF-oj* dependas ĉefe de profunda kono, laŭ merkataka vidpunkto, de lokaj cirkonstancoj, sed ĝenerale la sekvaj principoj utilis jam por pluraj festivaloj en pluraj urboj kaj landoj:

- 1) La estraro de la *LF* aŭ de ILEI decidu, ke la *LF* estas prioritato, ĉar estas la plej bona maniero afable kaj nealtrude kontakti la lokan publikon, por ke ili ekinteresiĝu pri E-o.
- 2) Metu la *LF-on* en bone konatan lokon. La plej bona estas lernejo. Universitatoj ofte estas idealaj lokoj, ĉar ĉiuj lokanoj scias, kie ili troviĝas, kaj studentoj estas oftaj partoprenantoj en *LF*.
- 3) Faru malmultekostan, simplan, klaran, allogan afiŝon. Faru multege da kopioj, metante ilin abunde ĉe la anonctabuloj de studentaj loĝejoj, kaj ĉe ĉiu publika loko kiu eblas. Dek kopioj ne sufiĉas! Por la *LF* de Francio, ni faris pli ol mil. Nur unu konstruaĵo de la universitato tie, uzis pli ol 100 afiŝojn!
- 4) Kreu simplan dosieron por la amaskomunikiloj. Donu la daton, la horaron, la liston de lingvoj. Bonvenas ankaŭ iom da informo aŭ statistikoj pri *LF-oj*. Sendu la dosieron al la gazetaro, radio-stacioj kaj televido. Poste, ne forgesu telefoni al ili ĉiuj por kontroli ĉu ili ricevis la informon kaj volas intervjui vin.

- 5) Komencu la amaskomunikilan kampanjon eble du semajnojn antaŭ la *LF*, kaj la afiŝadon unu semajnon antaŭe.
- 6) Ne forgesu, ke la metado de afiŝoj ne estas facila afero. Eĉ se vi sukcesas meti afiŝon sur publikan anonc-tabulon, tio ne garantias, ke kelkajn horojn poste ĝi ankoraŭ estas nekovrita de alia afiŝo aŭ ke ĝi ne malaperas. Kontrolu viajn afiŝojn ĉiutage ĝis la okazigo de la *LF*.
- 7) Se eblas, printigu simplan, malgrandigitan kopion de via afiŝo, kaj enmanigu ĝin al preterpasantoj proksime de la *LF*-ejo. Se leĝas, metu ĝin sur la glacon de ĉiu veturilo en radiuso de unu kilometro de la *LF*-ejo. Tion ni faris en la unuaj *LF*-oj de Francio, kaj ĝi bone sukcesis.

Resume, estas domaĝe se ni starigas *LF*-on dum ILEI-Konferencoj, kaj nur malmulte el la loka publiko ĉeestas ĝin pro la manko de bona loka informado kaj varbado. Mi rekomendas, ke en venontaj jaroj, ni pli bone pripensu la starigon de aktiva kampanjo por altiri kaj la publikon kaj la amaskomunikilojn. La spertoj en Francio, Rusio, Usono kaj Ĉinio klare montras, ke *LF*-oj estas la plej efika nuntempa maniero altiri novajn gelernantojn de E-o. Ni lernu uzi tiun efikan rimedon.

LA POLA EKSPRESE

Fariĝis kutimo, ke dum E-aranĝoj oni proponas al la partoprenantoj ekspresan kurson de la loka lingvo.

Dum la 42-a ILEI-Konferenco en Krakovo kaj la 94-a Universala Kongreso de E-o en Bjalistoko mi gvidis ekspresan kurson de la pola. La pola apartenas al la plej malfacilaj lingvoj, tial ĝia instruado/lernado prezentas defion kaj por la instruisto kaj por la lernantoj. Ŝajnas neeble lerni ion signifan pri la pola dum kvar horoj.

Dum ambaŭ aranĝoj "La pola eksprese" ĝuis grandan popularecon: dum la ILEI-Konferenco partoprenis en ĝi 7-15, kaj dum la UK, ĉirkaŭ 50-60 personoj. La kursetoj okazis kvarfoje po unu horon.

Mi ne volis lacigi la lernantojn per komplikaj gramatikaj reguloj, kiuj abundas en la pola. Mia celo estis instrui al ili nur iom da bazaj vortoj kaj frazoj, por ke ili povu iomete komuniki kun la pola medio en ĉiutagaj situacioj. Krome mi deziris instrui la ĝustan polan prononcon.

Mi instruis pri la jenaj komunikaj situacioj: salutoj kaj adiaŭoj, sinprezentado, bazaj parolturnoj, mendo de manĝo en restoracio, demandado pri prezo, aĉeto de bileto en stacidomo. Instruante la leksikon, mi prezentis i.a. la bazajn kaj ordajn numeralojn, tagojn de la semajno, monatojn, horojn, manĝojn, biletojn, trajnojn ktp.

Por variigi la lecionojn, ni kantis pole kaj provis prononci malfacilajn polajn frazojn.

Mia ĉefa metodo de instruado estis jena: mi skribis sur la tabulo kaj elparolis polajn vortojn aŭ frazojn kaj igis la partoprenantojn ripeti ilin. Poste mi petis ĉiujn konversacii kun la najbaroj. Pro la granda nombro da lernantoj, ne eblis, dum la konversacioj kontroli la ĝustecon de gramatiko kaj prononco kaj korekti eventualajn erarojn. Por ŝpari tempon mi klarigis ĉion kaj donis instrukciojn al la lernantoj nur en Esperanto.

Ŝajnas, ke kelke da personoj serioze ekinteresiĝis pri la pola lingvo - post ĉiu leciono ili restis kaj demandis pri la lingvo ĝenerale, pri ĝiaj gramatiko kaj vortprovizo.

Magdalena TATARA, Kasisto de ILEI-PL

Loke kaj fake, internacie kaj home **Prof. István SZERDAHELYI (1924-1987)¹**

de **Ilona KOUTNY** (ikoutny@amu.edu.pl)

Interlingvistikaj Studoj, UAM, Poznań (Pollando)

Enkonduke

La okazon rememori István SZERDAHELYI motivas la 85-jara datreveno de lia naskiĝo (kaj 22-jara de lia morto). Prof. Szerdahelyi estis bonega kaj efika pedagogo, aganta en- kaj eksterlande. Li fondis la E-fakon en la Universitato Eötvös Loránd (ELTE) en 1966 kaj gvidis ĝin ĝis sia morto. Per sciencaj metodoj li provis trovi la lokon de E-o inter la lingvoj naturaj kaj planitaj, lingvistike analizi ĝin, kaj formi instruistojn, lingvistojn kun

¹ La artikolo ekestis surbaze de prelegoj de la aŭtoro: 1. Samtitola dum ILEI-konferenco en Krakovo, julio 2009; 2. István Szerdahelyi: vivo, verko kaj heredaĵo – enkonduka prelego dum la Simpozio omaĝe al prof. Szerdahelyi dum la 94a UK en Bjalistoko, julio 2009.

profundaj konoj pri E-o. Du jarojn antaŭ sia morto li iĝis prezidanto de ILEI kaj dum unu jaro – en 1986 – redaktis IPR-n.

Longa vico da studoj kaj libroj, same ankaŭ prelegoj montras lian vastan interesiĝon kaj grandan labor-kapablon: li prezentis novan aliron al la morfologio, semantiko, etimologio de E-o; kun filologia precizeco li esploris interlingvistikon, kies rezulto estis la universitata lernolibro pri interlingvistiko kaj la populara libro *Bábelről a világnyelvig* 'De Babelo ĝis la mondlingvo'. Li sukcesis trovi la vojon al diversaj homoj, ĉar li kredis en tio, kion li faris, kaj havis estimon por la aliaj. Tion elstare montras la pretigo de la Hungara-Esperanta vortaro, kie kunlaboris 50 esperantistoj diversfakaj. La rezultoj de lia agado kaj verkaro estas ankaŭ nun aktualaj kaj vojomontraj.

1. Vivovojo – en la ŝtormo de historio



István SZERDAHELYI naskiĝis (20.08.1924, Ávas-felsőújfalu, nun: Negrești-Oaș en Rumanio) kaj plenkreskis en la plurlingva Transilvanio. Li finis militakademion kaj paralele ekstudis juron. Li partoprenis en la dua mondmilito kaj estis kaptita. La militkaptitecon li eluzis por lerni la rusan lingvon, kiu poste iĝis lia profesio [*surfote: "la juna instruisto"*]

Post la mondmilito lia familio transloĝiĝis al Hungario, li finstudis juron en la Universitato Péter Pázmány (laŭleĝa antaŭulo de ELTE) en Budapeŝto kaj poste rusan filologion. Li ekinstruis la rusan en elementa lernejo en la vilaĝo Kisbér, kie poste li iĝis lernejestro kaj pretigis gimnaziajn lernolibrojn pri la rusa (ankaŭ mi lernis el ili).

En 1956 li aliĝis al la revolucio, pro kio poste li estis malliberigita por pli ol jaro. Tiu evento rompis lian karieron, dum kelkaj jaroj li ne povis akiri instruistan postenon. Fine, en 1963, li ricevis postenon en ekonomika mezlernejo kiel instruisto de la rusa.

En 1949 li esperantistiĝis kaj rapide fervore ekinstruis la lingvon. Ekde la 60-aj jaroj li partoprenis en la laboro de la reorganiziĝanta HEA, li membris en la instrukomisiono kune kun Baghy, Balkányi, Kőkény kaj Pechán. Li kontribuis al la longe uzata *Gvidlibro por supera ekzameno*, kaj laŭ lia propono ekestis la trigrada ekzamensistemo. HEA kaj la tiama prezidanto Antal KOÓS subtenis lin ĉe la fondo de E-fako en ELTE.

Kvankam la rilatoj inter Szerdahelyi kaj HEA ne estis ĉiam tiel proksimaj, dum la lastaj du jaroj de sia vivo li iĝis vicprezidanto de HEA.



Li verkis artikolojn kaj librojn, sciencajn kaj sciencpopularigajn, instrumaterialojn, multe prelegis en Hungario kaj en aliaj landoj en esperanta medio (vd la kompletigantan bibliografion en la Memorlibro). Li havis bonajn kontaktojn i.a. kun la *Kultura Centro Esperantista* en La Chaux-de-Fonds (Svislando), kunlaboris kun la paderborna *Kibernetika-Pedagogia Instituto* (Germanio) pri lingvo-orientada instruado, kun Internacia Kultura Centro en Zagrebo (Kroatio) kaj ofte publikigis siajn vidpunktojn pri sciencaj temoj en *Literatura Foiro*. Liaj pedagogiaj artikoloj aperis ofte

en IPR kaj fine li prenis la merititan lokon de ILEI-prezidanto (1985-87) kaj iĝis honora membro de UEA [*surfote: Szerdahelyi en 1986*].

Post gravaj konfliktoj pro lia alia aliro al la radikkaraktero ankaŭ la Akademio de E-o elektis lin al siaj membroj en 1986. Post multe da sindediĉa laboro kaj batalo por la rekonigo de scienca agado pri E-o en kaj ekster Esperantio li mortis la 21-an de aŭgusto 1987 en Budapeŝto.

2. Fondo de E-fako en ELTE – elstara pedagogo kaj metodikisto

István Szerdahelyi batalis por la enkonduko de E-o en la lernejojn, elstarigis la propedeŭtikajn valorojn de E-o, kiuj por hungaroj estas nekontesteblaj. En 1963 E-o estis jam instruata en kelkaj hungaraj lernejoj. La lerneja instrueblo motivis la peton por la universitata formado de E-instruistoj. Li sukcesis krei ion unikan, kiam li fondis la E-fakon en la Universitato Eötvös Loránd (konata sub la siglo ELTE) en 1966 kun la subteno de la konata lingvisto Géza BÁRCZI.

Li ekiris malfacilan vojon, kiam li surprenis sola sur sin la E-fakon: li devis organizi el nenio la plurjaran kompleksan kursaron, similan al filologioj (kun lingvistiko, literaturo... metodiko), kiu gvidis al universitata diplomo; krei studplanon kaj studmaterialon, instrui kaj esplori. D-ro Szerdahelyi strebis prezenti al la scienca mondo la valorojn de E-o, akceptigi esperantologion, en pli vasta senco interlingvistikon kiel lingvistikan

branĉon (feliĉe la E-fako ekfunkciis kadre de la Lingvistika katedro) kaj konvinki esperantistojn pri la neceso de scienca esploro de E-o. Por tio necesis multe da laboro kaj la speciala personeco de István Szerdahelyi. Li, neŝparante sin, kun ĝojo laboris kaj sukcesis trovi la vojon al diversaj homoj.

Li verkis universitatajn lernolibrojn: *Esperanto* (1972), *Metodologio* (1975), *Interlingvistiko* (hungare, 1980), kompilis 3 volumojn de *Literatura Krestomatio* (1979, 1981, 1982). Aliajn gravajn tekstojn siajn, de kolegoj kaj gestudentoj li aperigis en *Esperantologiaj kajeroj I–III* (1976, 1977, 1977), kunlaborigante siajn gestudentojn. En 1978 la E-fako organizis internacian interlingvistikan konferencon, kies materialo aperis en *Miscellanea Interlinguistica* (1980).

Dumtempe li restis ĉarma kaj amuza interparolanto, kiu altiris homojn, kaj ĝisosta pedagogo, kiu kapblis ekŝatigi la studmaterialon. Li engaĝis siajn gestudentojn en la sciencan laboron, kiuj partoprenis en scienca studenta rondo, sendis ilin al konferencoj, kunvenoj, se eblis eksterlandaj, kaj trovis taskojn laŭ ilia emo kaj helpis ilin en la realigo – tiu sinteno estas malofta en universitatoj. Ekzemple li sendis min staĝi al KCE (franclingva Svislando), kio signifis por mi grandan travivaĵon. Li estis “vera pedagogo, kiu kapablis transdoni vivosperton, sian optimismon, laboremon, estimon de la scienco...” (Varga-Haszonits 1998). Ni, gestudentoj tre ŝatis lin, mia generacio nomis lin *Paĉjo* inter si.

Dum lia 21-jara instruado en la E-fako preskaŭ 100 gestudentoj diplomiĝis pri E-o en la tagaj kaj (ekde 1972) t.n. korespondaj kursoj, el inter kiuj kelkaj havas nun gravan rolon en la E-movado. Ili kunvenis en 1986 por kune festi la 20-jariĝon de la fako. Naskiĝis ankaŭ multaj diplom-laboraĵoj pri esperantologio kaj interlingvistiko, ilia konservo, prilaboro kaj daŭrigo necesus.

3. Esploroj pri lingvopedagogio

Szerdahelyi esploris la leksikan materialon de diversaj lingvoj en la lerneja instruado kaj komparis ilin helpe de la gestudentoj. Li gvidis eksperimentojn por pruvi la lernfacilecon kaj propedeŭtikan valoron, t.e lernfaciligon de E-o. La plej grava estis la 5-landa eksperimento inter 1971-74, en kiu partoprenis Bulgario, Italio, Jugoslavio, Aŭstrio kaj Hungario. La celo estis prezenti la facilecon de E-o, ĝian efikon en la kompreno de la

gepatra lingvo kaj fremdaj lingvoj (tion reprenas ankaŭ la nuna projekto *Lingvolanĉilo!*), la propedeŭtikan valoron de E-o por la sekva fremda lingvo (vd. Szerdahelyi 1976, 1979, Kovács 1981). Li bone vidis, ke la pli facila alproprigeblo de iu lingvo dependas ne nur de ĝia strukturo (absoluta facileco), sed ankaŭ de la rilato kun la gepatra lingvo de la lernanto (relativa facileco).

Por hungaroj E-o kun siaj hind-eŭropaj trajtoj kiel la prepozicia sistemo prezentas modelon de hind-eŭropaj lingvoj, ĝia lernado helpas ankaŭ la komprenon de scienca vortprovizo en la hungara, sed per maksimuma simpleco. Tio alportas pozitivan psikan valoron en la regado de la lingvo. Li konkludas, ke E-o estas neŭtrala kontaktilo, lingva kaj kultura sintezo, tiel enhavas *internacian kulturan potencialon* (Szerdahelyi 1976). Nur la motivigo por E-o estas malgranda kompare kun la angla, li konsideras, ke esperantistoj devus eliri el sia interna mondo kaj trovi sian lokon en la ekstera establita mondo por ke oni prenu ilin serioze.

La konkretajn esplorrezultojn li povis proponi al oficialaj instancoj por serioza pritraktado de E-o kaj fruktuzis en siaj lernolibroj. *Esperanto internacia* 1-2 – origine por infanoj – estis kaj estas uzata por instrui junulojn.

4. Aŭtonoma lingvisto

Pro la bezonoj de universitataj studoj Szerdahelyi okupiĝis pri ĉiuj terenoj de la lingvopriskribo. Li uzis lingvistikajn kriteriojn por priskribi E-on, tiel lia aliro en multaj aspektoj estas noveca kaj eĉ konfliktiĝas kun la tradicia gramatika aliro. La kulmino estis la konflikto kun AdE kaj ĝia korifeo, Kalocsay. Li kuraĝis kontraŭi la klasikan teorion pri la ekzisto de radikkaraktero, reprezentata – tiam kaj ankaŭ nun – de AdE. La diskutoj okazis en LF kaj li eldonis kajeron *Vorto kaj vortelemento* en 1976.

Szerdahelyi inter la unuaj komencis priskribi la semantikan flankon de E-o. Li rimarkis, ke malantaŭ laŭforme latinida vortoprovizo kaŝiĝas ofte slavaj signifoj. Inter la unuaj li komencis trakti la esperantan etimologion, la transprenajn procedojn de Zamenhof kaj ĝiajn malkonsekvencojn. Li verkis ankaŭ pri grafemiko, sed la verko jam ne povis aperi. Estas grave, ke li trovis la lokon de esperantologio kaj interlingvistiko en pli vasta kadro de aplikata lingvistiko, en la lingvoplanado.

En sia lasta skiza teksto *Diakrona kaj sinkrona esperantologio* (*Informilo por Interlingvistoj* 1987/2), kiun Ryszard ROKICKI prave nomas “esperantologia testamento”, li dividas la centjaran historion de la lingvo en tri periodojn: 1) la ekesto: epoko karakterizata de la Zamenhofa „Fundamento”, de la Universala Vortaro; 2) la ekfunkciado: epoko ekde la 20-aj jaroj, kiam la *Budapeŝta Skolo* kreas la „Duan Fundamenton” per la nova literatura lingvo kaj aperas la Plena Vortaro kaj Plena Gramatiko; kaj 3) la epoko ekde la 60-aj jaroj: kiam elformiĝis esperantologio kiel scienco, sed kiu ankoraŭ ne elformis sian „Trian Fundamenton”.

Ĉu nun, post 22 jaroj, ni havas ĝin? Ĉu krom NPIV, la Reta Vortaro kaj la Esperanta Tekstaro ni bezonas ankoraŭ ion? Ŝajnas al mi, ke la detala lingvosciencia priskribo estas ankoraŭ antaŭ ni.

5. Preciza Interlingvisto

Li traktis interlingvistikon en vasta senco, en la kadro de lingva komunikado kaj lingvopolitiko, kune kun ĉiuspecaj interlingvoj, inter kiuj rolas etnaj, piĝinaj, kreolaj lingvoj kaj planlingvoj (simile kiel multaj esperantologoj tiam kaj poste, ekz. Blanke, Tonkin, Fettes) kaj ne limigis ĝin al planlingvistiko (kiel Sakaguchi).

Li esploris diversajn planlingvojn, inter ili hungarajn kaj instigis siajn studentojn al tia laboro (tiel mi komencis studi la prilingvajn ideojn de la fama hungara matematikisto Bólyai).

Li verkis la hungarlingvan sciencopopularigan libron *Bábeltől a világnyelvig* ‘De Babelo ĝis la mondlingvo’, hungaran universitatan lernolibron kaj sian disertaĵon (bedaŭrinde ne neeldonitan), krom multaj artikoloj.

6. Leksikografo – meza/granda vortaro ĉiutaga/faka

La granda entrepreno pri la **Hungara–Esperanta meza vortaro** komenciĝis en 1983 (kaj ĝi aperis nur en 1996). Ekzistis tiam nur malgranda hungara vortaro, tiu de Pechan, kiel pli granda tiu de la germana Krause. La bazajn principojn Szerdahelyi ellaboris laŭ la postuloj de la Akademia eldonejo, kiu mendis tiam la laboron.

En ĝi troviĝas malpli da derivitaj vortoj ol en kutima hungara vortaro pro la reguleco de E-o (kaj iusence de la hungara). Tio ebligis la enmeton de sufiĉe multaj fakvortoj, kiujn ellaboris kvindeko da fakuloj. La sociscienca terenon redaktis Blazio VAHA kaj la teknikan-naturscienca

Ottó HASZPRA. La tuta hungara esperantistaro estis mobilizita por la vortaro.

La vortaro tiutempe estis verŝajne la plej granda nacilingva-Esperanta vortaro kun ĉ. 45 mil kapvortoj kaj 60 mil leksikaj unuoj. Li laboris pri ĝi ĝis la fino de sia vivo prokrastante la finaranĝon de sia disertaĵo. Tamen la finredakto kaj komputila prilaboro devis okazi post lia morto fare de Ilona KOUTNY.

Prof. Szerdahelyi mortis tro frue – apenaŭ havis 63 jarojn – kaj neatendite..., lasante multajn taskojn al la posteuloj. Dum preskaŭ jardeko (1987-96) mi provis daŭrigi lian laboron instruan kaj sciencon, realigi la planojn (fini la redaktadon de la Hungara-Esperanta meza vortaro, lanĉi la internacian Esperantologian fakon, ktp.) kaj vivteni la etoson kreitan far li. Feliĉe pluraj hungaraj kolegoj helpis en la bonnivela instruado en la E-fako, inter ili Zsuzsa BARCSAY, kiu jam ne estas inter ni. Kvankam lia granda atingiĝo, la E-fako de ELTE, devis fini ĉi-jare sian funkciadon, lia vivoverko kaj memoro estas vivanta.

Bibliografio

- Gados Zsuzsa 1998: *D-ro István Szerdahelyi (1924-1987)*. Diplumlaboraĵo, Budapeŝto: ELTE, troviĝos en Edukado.net.
- Koutny Ilona 1997: *Profesoro Szerdahelyi forpasis antaŭ 10 jaroj (rememoro kaj ĝustigo)*. En: IPR 1997/3; <http://www.edukado.net/pagina/Legejo/149/#704>.
- Koutny Ilona 2009: *Antaŭparolo*. En: *Abunda fonto. Memorlibro omaĝe al prof. István Szerdahelyi*. Red. Ilona Koutny. 2009. Poznań: ProDruk & Steleto.
- Kovács Márta 1981: *Internacia pedagogia-didaktika eksperimento kvinlanda (1971-1974)*. Diplumlaboraĵo, Budapeŝto: ELTE, troviĝos en Edukado.net.
- Szerdahelyi István 1976: *Pedagogiaj valoroj de instruado de Esperanto*. En: *Internacia Lingvistika Simpozio, Kumrovec 1975*. Red. Zlatko Tišljar. Zagreb: IKS. 9-18.
- Szerdahelyi István 1979: *La didaktika loko de la internacia lingvo en la sistemo de lernejoj studobjektoj*. En: D. Blanke (red.) *Esperanto: la internaciaj lingvo-sciencaj aspektoj*. Berlin: Kulturligo de GDR. 211-219.
- Szerdahelyi István 1987: *Diakrona kaj sinkrona esperantologio*. En: *Informilo por Interlingvistoj* 1987/2.
- Varga-Haszonits Zsuzsa 1998: *István Szerdahelyi. La pedagogo*. En: *Memorlibro. Konferencmaterialoj el 1997*. Red. Tamás Gecső kaj Zsuzsa Varga-Haszonits.

Sonmaterialoj de Szerdahelyi:

<http://www.ilei.info/hungario/sonmaterialoj.php>.

Afrikaj perspektivoj: daŭrigo kaj nova komenco ILEI-seminario en Kinshasa

Post la sukceso de la unuaj du aranĝoj de ILEI en Afriko – la seminario en 2007 kaj konferenco 2008, ambaŭ en Benino – interkonsulte kun la Afrika Komisiono de UEA kaj aliaj esperantistaj organizaĵoj en Afriko, ILEI decidis daŭrigi la serion, nun en DR Kongo, por subteni la movadon en tiu parto de Afriko.

La seminario okazis inter la 4-a kaj 11-a de julio 2009 en Kinshasa. La gastiganto estis la Nacia Pedagogia Universitato (franca akronimo UPN) kaj la Rektoro mem malfermis la seminarion en tiu-okaza solenaĵo. La ĵurnalo de ACP (Informagentejo de Kongo) informis pri la seminario per artikolo titolita “Formado de instruistoj de UPN en internacia lingvo Esperanto”.

Partoprenis 25 komencantoj (fakte plejparte komencintoj), el kiuj 24 sukcesis en la fina testo, kaj 15 progresantoj kaj Esperanto-instruistoj, el kiuj fine 14 ricevis la atestilon de *Flugiloj*². Instruis Radojica Petrović el ILEI kaj Xosé Conde el la teamo de *Flugiloj de malfacila vento*. Krom la prilingvaj kaj metodikaj lecionoj kaj ekzercoj, la partoprenantoj ĝuis muzikajn paŭzojn, kiujn muzikgrupo de kelkaj seminarianoj plenumis per Esperantaj kantoj, rave spicitaĵoj per Afrikaj sonoj, ritmoj kaj sentoj, kiujn la ceteraj

El la inaŭgura parolo de la rektoro de UPN

...

Mi havas la agrablan devon deziri al vi ĉiuj koran bonvenon al ĉi tiu seminario dediĉita al esperantistaj instruistoj. Nia universitato, kaj tra ĝi nia lando, estas vere honorigita per la elekto esti okazejo de ĉi tia tipo de seminario inter la unuaj en Afriko.

...

Ne estas necese, ke mi prezentu al vi Esperanton. Fakte, ĉi tiu lingvo estas rekonita de Unesko ekde 1954. Mi volus simple rememorigi ĉi tie, ke Esperanto entenas la ideon de **ESPERO** liberigitan de ajna religia aŭ politika konotacio.

Elfrancigis R. Petrović

² *Flugiloj de malfacila vento*, komuna projekto de ILEI kaj E@I por enkonduka metodika trejnado al junaj E-instruistoj

akceptis kaj akompanis kante kaj dance. Provmecionoj de la instruemaj progresantoj ne nur donis al ili la okazon elprovi sian instrulerton, sed ankaŭ ebligis al la seminarigvidantoj kompari la tradiciajn lingvoinstruajn alirojn en Afriko kun tiuj, kiujn proponas *Flugiloj de malfacila vento*.

El impresoj de partoprenintoj

Dum tiu ĉi seminario mi lernis multe kaj ĝi estis por mi granda okazo por perfektigi en la internacia lingvo. La amika etoso inter partoprenantoj, kaj inter la gvidantoj kaj la partoprenantoj estis vere varma kaj frata. Post la seminario, mi deziras, ke ni gardu kontakton.

Honoré Tandu Bokolo

Mi havas bonajn impresojn post ĉi tiu seminario. Mi lernis la manieron vivi kune, la manieron por instrui kaj lerni Esperanton, do tre interese. Mi pensas, ke ĉi tio ne estas lasta seminario, mi deziras aliajn.

Liliane Kandolo Matshakunde

La lastan tagon de la seminario mi ploretis sciante, ke ni ne plu vivos ĉi tian tempon kiam ni jam alkiutimiĝis inter ni. Mi do pensas, ke ĉi tia aktivaĵo devus okazi ĉiujare kaj tiamaniere ni ankoraŭ pli bone kaj korekte uzos la lingvon.

Vivu ILEI kaj vivu Esperanto!

Junior Ngangu Bakidila

La seminario ne nur plialtigis la lingvajn kaj metodikajn konojn de la partoprenantoj, sed ankaŭ ebligis pli bone kompreni la Esperanto-didaktikajn problemojn kaj bezonojn en DR Kongo. Instruistoj tie laboras sub tre malfacilaj kondiĉoj materiaj kaj teknikaj, sen sufiĉaj legmaterialoj, ĉefe laŭ malnovaj lingvoinstruaj metodoj. Ilia plurlingveco (denaska loka lingvo depende de la naskiĝloko, plus unu aŭ kelkaj aliaj lokaj lingvoj depende de loĝloko kaj dumviva migrado, plus la franca kiel deviga ekde la unua klaso de la baza lernejo kaj oficiala ŝtata lingvo) havas kaj lernfaciligan kaj interfere bremsan efikon al akirado de E-o. Oni petas kaj esperas novajn ILEI-seminariojn en DR Kongo kaj alitipan helpon por akceli la solvado de tiuj problemoj kaj plisukcesigi utiligadon de la ekzistantaj ŝancoj.

La Rektoro de UPN akceptis delegitaron de ILEI kaj principe aprobis, ke en UPN estu organizata formado de E-pedagogoj, des pli se tio helpus venig al UPN el eksterlando mankajn instruistojn pri informadikaj kaj matematikaj

fakoj, kiuj samtempe prizorgus E-fakon. Nun estas grava tasko por ILEI fari projekton kaj konkretajn paŝojn por realigi tion. La unuaj diskutoj okazis enkadre de la universitatagada sesio dum la konferenco en Krakovo kaj pluan prizorgon transprenas kunlabore la estraranoj pri universitata agado kaj pri edukprojektoj.

Tio celtrafe motivigas novajn investojn en la Afrikan agadon kaj serĉadon de investfontoj ĉe fondaĵoj kiuj subtenas edukajn, kulturajn kaj evoluajn projektojn en Afriko kaj interkulturan interŝanĝon kun Afriko. El pluraj interparoloj dum kaj ĉirkaŭ la seminario ni konkludis, ke multaj homoj en DR Kongo lernis Esperanton kaj ankoraŭ lernas jene aŭ alimaniere aŭ ŝatus lerni, sed malmultaj restas en la movado. Multaj el ili foriras pro neeblo kontentigi siajn materiajn kaj vivbezonaĵajn interesojn per Esperanto. Ŝajne estis multe da misuzoj, ĵaluzoj kaj skismoj pro la mono ricevita el Eŭropo diverskanale, donita subtene al Esperanto sed ne ĉiam tiel uzita. Plia investado en Afrikan Esperantujon devas esti pli atente planata, kunordigata kaj kontrolata, kun plena partopreno kaj kunrespondeco de niaj kolegoj el Afriko por la planado, plenumado de la planoj kaj utiligado de subvencioj.

Konklude, la agado de ILEI en Afriko bone daŭras, sed la ĵusa seminario en Kinshasa ankaŭ malfermas novajn perspektivojn de kunlaboro kun universitatoj kaj aliaj neesperantistaj institucioj, plu esplorindajn kaj uzindajn por la tuta Afrika Esperantujo.

Radojica PETROVIĆ

TAGO DE LA LERNEJO DUM UK

La Tago de la Lernejo okazis mardon, la 28-an de julio, en la salonoj Brozović kaj Lapenna inter la horoj 9 – 15 havante la ĉi-jaran temon: *Novaj lerneteknologioj kaj Esperanto*.

Malfermis la programon s-ro Mihai TRIFOI, la organizanto kaj gvidanto de tiu kongresero. Per kelkaj enkondukaj vortoj li anoncis la strukturon de la TdL-programo kun ĝiaj tri partoj: I. Enkonduka parto (9.00-9.25); II. Unua serio de prelegoj (9.25-12.45); III. Dua serio de prelegoj (13.00-15.00), kaj petis la prezentontojn respekti la rezervitan tempon.

Sekvis la Enkonduka parto, la salutoj fare de: D-ro Duncan CHARTERS, nova vicprezidanto de ILEI, S-ino Claude NOURMONT, vicprezidanto de UEA kaj UEA-observanto ĉe ILEI, S-ino Magdalena TATARA, nome de la pola ILEI-Sekcio, kiu faris ankaŭ mallongan prezenton pri la eduksistemo en Pollando.

Dum la Unua serio de prelegoj la ĉeestanta publiko havis la plezuron aŭskulti kelkajn el inter la plej famaj kaj spertaj esperantistoj :

- D-ro Humphrey TONKIN el Usono prelegis pri „*Universitataj studoj pri Esperanto en teknike kunligita mondo*”;
- D-ro Renato CORSETTI el Italujo prezentis la prelegon: „*Bonaj radikoj por bona lernolibro, utiligante la novajn komputilajn eblojn*”;
- D-ro hab. Ilona KOUTNY el Pollando: „*Novaj direktoj en la formado de E-instruistoj*”;
- D-ro Maŭro LA TORRE el Italujo: „*Lingva lernado kaj teksto-statistiko*”;
- S-ino Lucille HARMON el Usono: „*Kiel ni povas uzi la reton por reklami Esperanton kaj helpi al la instruado de Esperanto*”;
- D-ro Duncan CHARTERS el Usono: „*Nova teknologio por instruado de Esperanto kaj per Esperanto*”;
- S-ro Tomaž LONGYKA el Slovenujo: „*La Zagreba lernolibro por komencantoj – analizo bazita sur personaj spertoj*”;
- S-ino Irena SZANSER el Pollando (prezentita de Nina DANILJUK): „*Parolgenerilo – semantika lingva modelo por krea instruado de la lingvo*”;
- S-ino Zsófia KÓRÓDY, ILEI-estranano pri instrukapabligado kaj edukaj centroj, Germanio: „*Ne nur virtuala amikeco: Comenius-projekto kaj ĝemelurbaj kontaktoj de lernejoj en Herzberg*”.

Dum la Dua serio de prelegoj (13.00 – 15.00) okazis aliaj tre interesaj prezentoj:

- S-ro Ed BORSBOOM el Nederlando: „*La Cseh-metodo estas tre vivanta*”;
- D-ro Seán Ó RIAIN, irlanda diplomato, Bruselo: „*La ekonomia krizo kaj lingvolernado: ĉu oportuno / ŝanco por Esperanto?*”;
- S-ino Marija MAJERCZAK el Pollando: „*Perreta partopreno en E-kursoj de Jagelona Universitato – informo, materialo-specimenoj*”;
- S-ino Angela TELLIER el Britujo (prezentita de Tim MORLEY): „*Lingvolanĉilo / Teknolanĉilo*”;
- S-ro Stano MARČEK el Slovakio : „*Esperanto per rekta metodo / Lerniloj kaj didaktikaj materialoj de Stano Marček*”;

– Prof. Julián HERNÁNDEZ ANGULO el Kubo: „*Survoje al pli efika lingvo-kompetento pere de modernaj lerniloj*”.

Post la lasta prelego, s-ro Mihai TRIFOI kaj Duncan CHARTERS dankis al la ĉeestantoj por partopreno kaj fermis la TdL-programon.

Entute prezentis siajn spertojn, ideojn, produktojn aŭ sugestojn 15 prelegantoj el 10 landoj. Vizitis la salonon dum la Tago de la Lernejo preskaŭ 100 esperantistoj.

Gvidis la programon: Mihai TRIFOI, Jennifer BISHOP kaj Maŭro LA TORRE.

Protokolis: Luigia OBERRAUCH MADELLA kaj Anna Maria COLACICCHI.

*Raportis: Mihai TRIFOI (Lerneja Komisiono de ILEI)
kaj Duncan CHARTERS (vicpr.)*

Formoj de aktivigado de lernantoj dum didaktika procezo

de **Maciej KŁAKLA**, *Pedagogia Universitato, Kraków, Pollando*

1. Enkondukaj rimarkoj

Precizigitaj dum jarcentoj ĝeneralaj principoj de edukado (kiel ekzemple: pligrandigado de malfacilaĵoj, kunigado de teorio kun praktiko, ĉu scienceto) plenumas fundamentan rolon ankaŭ nuntempe kaj malgraŭ provoj de ties modifoj aŭ kompletigoj, formas nekontesteblan elirpunkton dum efektivigado de la diversaj konceptoj de edukado. Tio koncernas ankaŭ la instruadon de matematiko. En tiu sfero de la instruado tamen unu el tiuj principoj, nome la principo de la konscia kaj aktiva agado de lernanto en la procezo de instruado, plenumas specialan rolon, donante al lernanto la pozicion de subjekto dum diversaj didaktikaj penadoj. Anna Zofia KRYGOWSKA (mondfama pola didaktikistino pri matematiko) suprenlevis tiun ĉi principon ĝis la ĉefa, la plej grava en la instruado de matematiko. Aplikado de tiu ĉi principo emfazas la rolon de la instruisto-organizanto de la procezo de lernado.

Direktado de tiuspeca edukado postulas konon de la sinsekvo de lernadprocezoj kun profunda kompreno de la karakterizaĵoj de la lerno-



bjekto kaj de la celoj de ties instruado. Interalie nepra estas trovo de motivoj konvenaj al la aĝo kaj intelekta nivelo de lernantoj kaj ties influo al preparo de projektataj didaktikaj okupoj.

Parolante pri la aktivigado de lernantoj, ni pensas kompreneble pri ilia aktivigado intelekta. Dum la edukado de plenaĝuloj, kiuj prenas sur sin la taskon de lernado, sufiĉan motivigon donas la konscienca decido altigi la posedatajn kvalifikojn, kaŭzita pro eksteraj cirkonstancoj (ekz. emo ŝanĝi laborlokon por akiri pli bonajn kondiĉojn aŭ pli leĝeran laboron). Se temas pri infanoj, ne posedantaj klaran konscion de bezono de sia disvolviĝo, trovo de aliaj motivoj krom intelektaj estas tre grava.

En la instruado de ĉiu lernobjekto, valora estas la realigado de ne nur edukaj celoj por ĝi specifaj, sed realigado de celoj ligitaj al la disvolvado de intelektaj agoj kaj reagoj, kiuj povas esti formataj en lernobjekta instruado, kaj aplikataj en aliaj vivsituacioj, danke al supozebla transfero. Al tiuj celoj de instruado apartenas interalie formado de aktiva sinteno rilate al aperantaj problemoj, disvolvado de kapablo labori en grupo kunlaboranta aŭ konkuranta, formado de kapablo diskuti, disvolvado de scipovo legi kun kompreno kaj interkompreniĝi (en tio prezenti sian opinion al grupanoj).

2. Metodo de spertuloj – priskribo kaj analizo

Unu el la efikaj formoj de la akitivigado de lernantoj dum la procezo de lernado estas la t.n. „metodo de spertuloj”, permesanta realigi karakterizajn celojn de instruado, paralele kun la stimulado de sintenoj kaj intelektaj agoj, gravaj por efika funkciado de la homo en la nuntempa demokratia socio.

Por mallonge priskribi tiun ĉi formon de aktivigado de lernantoj, ni supozu, ke dum la lernejoj okupoj ili devas trovi solvojn de sendependaj problemoj. Ni priskribos tiun ĉi formon de la organizado de okupoj, turnante specialan atenton al:

- procezoj de komunikado dum tiuj okupoj,
 - realigado de la principo: plenumu la taskon, klarigu kaj priskribu ĝin.
- Tiu ĉi lasta principo koncernas jenajn tri situaciojn, en kiuj la lernanto povas sin trovi:

- situacio, en kiu lernanto mem atakas kaj solvas la problemon,

- situacio, en kiu lernanto devas klarigi al aliaj personoj kiamaniere li/ŝi trovis la solvon, aŭ ĉiĉeroni en procezo de serĉado de problemsolvo,
- situacio, en kiu lernanto devas prezenti koncize redaktitan solvon de la problemo.

Por fiksi nian atenton, ni supozu, ke ni realigos okupojn, dum kiuj oni devos plenumi kelkajn, sendependajn taskojn – problemojn (ekz. kvar – tiun nombron mi fiksos en la sube prezentata priskribo). Depende de la lernobjekto ĉi tiuj problemoj povus aspekti diverse: se temas pri matematiko – tio povus esti kvar problemaj taskoj por lernantoj, en la kazo de historio oni atendus la analizon de la agado de kvar elstaraj personoj, en la kazo de la pola lingvo – lingvan analizon de kvar fragmentoj de literaturaj verkoj, en la kazo de fiziko oni postulus la preparon kaj efektivigon de kvar eksperimentoj.

Ni priparolu unue la plej simplan varianton, kiam la problemoj por solvo estas relative simplaj kaj trovo de la solvoj ne bezonas pli ol 15 minutojn. La okupojn ni dividu en kelkajn etapojn.

Etapo I (informa)

En tiu etapo la instruisto montras al la lernantoj la planon de la leciono, dispartigas ilin en kvar grupojn (numeritajn I, II, III, IV), informante, ke en ĉiu grupo oni devos trovi la solvon de ricevota problemo, sed ne nur tion. La instruisto eksplikas, ke ĉiu lernanto ne nur devos koni la solvon, sed devos pretiĝi por esti spertulo pri tiu problemo en la dua etapo, por anoj de aliaj grupoj. La rolo de spertulo en tiu dua etapo estos: klarigo – se necesos – de detalaĵoj kaj duboj, koncernantaj la problemsolvon, kaj ankaŭ taŭga ekspliko – en la kazo, kiam la aliuloj mem ne trovos la solvon – de indikoj faciligantaj al la anoj de la ceteraj grupoj memstaran trovon de la solvo. La instruisto disdonas antaŭe elektitajn kvar problemojn P I, P II, P III, P IV por ĉiu el la kvar grupoj. La lernantoj komencas la laboron. Tiu unua etapo devas daŭri ĉirkaŭ 5 minutojn.

Etapo II (de serĉado)

Por tiu etapo ni dediĉu ĉirkaŭ 15 minutojn. Dum tiu tempo la lernantoj en ĉiu grupo serĉas la solvon de la ricevita problemo. La instruisto observas ilian laboron, donante – se necesas – koncernajn indikojn. Enŝoviĝo de la instruisto povas esti esenca por konduki lernantojn al ekkono de la problemsolvo. La rolon de la instruisto en tiu etapo ni

precizigu jene: stimulado de la esplora aktiveco de lernantoj, diskreta kontrolo de la ĝusteco de proponataj solvoj kaj demandado provokanta detalajn eksplikojn kaj argumentadon fare de lernantoj.

Etapo III (laboro de spertulo)

Tiun etapon ni komencas dividante denove kaj alimaniere la lernantojn en grupojn. Pro tio, ke la lernantoj en la dua etapo serĉis en kvar grupoj solvojn de kvar problemoj, nun ni dividas ilin en kvar grupojn: A, B, C, D (se ili estus serĉintaj solvojn de ses problemoj, ni dividus ilin en ses grupojn). Ni zorgas pri tio, ke en ĉiu nova grupo troviĝu almenaŭ unu lernanto de la grupo I, kiu en la dua etapo iĝis spertulo pri la unua problemo, almenaŭ unu de la grupo II, kiu en la dua etapo iĝis spertulo pri la dua problemo, almenaŭ unu de la grupo III – spertulo pri la tria problemo kaj almenaŭ unu de la grupo IV – spertulo pri la kvara problemo. Tiamaniere en ĉiuj kvar novaj grupoj A, B, C, D estas spertuloj pri ĉiu problemo solvita en la antaŭa etapo.

Nun la lernantoj de ĉiuj grupoj A, B, C, D devas solvi ĉiun de la kvar problemoj. Por tio ili havas nur 20 minutojn, sed ili povas – se tio necesos – peti la helpon de spertuloj kaj postuli ricevon de sufiĉaj klarigoj. La instruisto, kiel antaŭe, observas la laboron de la lernantoj en grupoj, ekzamenante interalie, ĉu la spertuloj bone plenumas sian rolon.

Etapo IV (prezentado)

Dum tiu etapo lernantoj prezentas la solvojn de la problemoj antaŭ la tuta klaso. Por la prezentado la instruisto indikas po unu lernanton de ĉiu grupo, sed tiel, ke la lernanto kiu prezentos la problemsolvon ne estu spertulo pri tiu problemo. Kiam la taskoj, kiujn devos plenumi la lernantoj, ne postulas multan tempon, la prezentado povas iĝi la lasta parto de la leciono. Tiu plej simpla varianto, ebla por efektivigo dum unuhora leciono, estas konvena por la klasoj I, II, III, kiam la taskoj – problemoj por lernantoj ne estas tro malfacilaj kaj penigaj, kaj la prezentado por la tuta klaso povas okazi dum la sama leciono.

En la klasoj por pli aĝaj lernantoj kaj en klerigado de plenaĝuloj, kiam la taskoj – problemoj por studentoj estas pli malfacilaj, valoras prilabori la varianton kun asistantoj. Tiucele (unu semajnon antaŭ la planitaj okupoj) oni elektas inter la lernantoj kelkajn personojn tiel nomatajn asistantojn (tiom da ili, kiom da problemoj ni proponos). Ili atingis antaŭe bonajn rezultojn dum lernado, precipe memstara. La

instruisto montras al ili problemojn P I, P II, P III, P IV kaj, laborante kun ili individue, direktas la procezon de la problemsolvado. Dum la lasta semajno antaŭ la planata leciono ili estus devintaj solvi ĉiujn kvar problemojn kaj pridiskuti la solvojn kun la instruisto. Kiam dum la leciono kun la tuta klaso komenciĝas la dua etapo, la asistantoj aliĝas al la koncernaj grupoj plenumante tie la rolon de la instruisto, la rolon priskribitan supre. En la sama tempo la instruisto havas la okazon observi kaj la lernantojn laborantajn en la grupoj kaj la asistantojn, gvidantajn la laboron de la lernantoj en la grupoj.

Dum la tria etapo asistantoj helpas al la instruisto organizi novajn grupojn kaj observas la laboron de lernantoj – spertuloj en la grupoj. Oni povas tion profite uzi por organizi konkuradon kaj ekz. elekton de la plej bona spertulo aŭ sisteman pritaksadon de la laboro de spertuloj. En la lasta etapo spertuloj povas ankaŭ plenumi la funkcion de ĵurio kiu taksas la preparon de la prezentadoj.

Ni analizu nun la procezon kaj organizadon de la supre proponitaj okupoj el la vidpunkto de la premisiitaj celoj de la edukado. Antaŭ ĉio ni substreku, ke dum la okupoj ĉiu lernanto, kiu proponas sin por solvi problemon, renkontiĝas trifoje, ĉiam en alia situacio. En la dua etapo li serĉas la solvon. En la etapo tria, la tasko de la lernanto estas: klarigi al alia persono solvon de unu el la problemoj kaj kompreni aliajn problemojn, danke al la eksplikoj de ceteraj lernantoj. En la kvara etapo la lernanto „ricevas” la prezentadon de problemsolvoj aŭ prezentas trovitan solvon.

En la unua etapo okazas informtransmisio de instruisto al lernanto. Tia situacio ofte regas dum la instruado, speciale dum la instruado tradicia. Instruisto estas tiam la fonto kaj “relajso” de informoj. Lia komunikaĵo, bazita sur propra vivsperto kaj la faklingvo, kiun li uzas, devas atingi la lernantojn, se ili ne estas misformitaj per neeviteblaj en tia situacio perturboj, kaj se la lernantoj deziras percepti. Malgraŭ tio ĝi povas esti nekomprenebla por la lernantoj, ĉar iliaj vivspertoj kaj la lingvo, kiun ili uzas, esence diferencas de la lingvo kaj vivspertoj de la instruisto. Se ni tamen dezirus, ke la parolturnoj de la instruisto estu modelo por la lernantoj, li ne limigu sian „faklingvon” al la nivelo de la lernantoj. Tiu skemo de la komuniko de informoj ne favoras ekeston de rekuplo inter ekspedanto kaj adresato – la lernantoj estas neaktivaj ricevantoj de la informoj, kaj eĉ se ili povas demandi (kaj tio ne estas facila en la ĉeesto de la tuta klaso, ĉar ĝi malkaŝus ilian nescion), ja nur en limigita grado, sen espero ricevi porindividuajn respondojn.

En la dua etapo la situacio de la komunikado ŝanĝiĝas. La lernantoj, serĉante la problemsolvon, diskutas en malgrandaj grupoj. Ili uzas sian lingvon kaj alvokas siajn kompareblajn vivspertojn, kaj interveno de la instruisto, se necesas, pli facile estas akceptata kaj komprenata. Nun estas pli bona okazo sin turni al la instruisto kun individuaj demandoj, kiuj plifaciligas la plenumon de la tasko de la unua etapo – fariĝi spertulo de la solvata problemo.

La tria etapo laŭ vidpunkto de komunikado similas al la antaŭa, sed ĉiu lernanto devas, en la kazo de bezono, prezenti sian opinion antaŭ la tuta grupo, en la rolo de spertulo. Jen do estas la etapo, dum kiu oni devas klarigi efektivigitan laboron al aliaj personoj.

Se inter la etapoj tria kaj kvara – dediĉita al prezentado, ekestos libera tempo por pripenso, indus serĉi certan sintezon kaj kompletigon de la laboro farita en antaŭaj etapoj. Lernantoj destinitaj al prezentado povas nun ekparoli antaŭ la tuta klaso.

Tre konciza, la supre prezentita analizo de premisitaj celoj de la metodo de spertuloj, povas esti la elirpunkto por serĉado de tiuj formoj de organizado de okupoj dum la eduka procezo, kiuj helpas al ĉiufanka intelekta aktivigado de la lernantoj.

Esperantigis: Adam ŁOMNICKI

SUŜIO & SAKEO – *japannoma Intrareto preparita en pola kuirejo*

SUŜIO kaj SAKEO estas novtipaj platformoj kreitaj en la Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo en Krakovo, Pollando. Kiamaniere oni “manĝas” ilin? Jen klarigo.

La pollingva akronimo SUSZI (prononco: SUŜI) signifas Reta Altlerneja Sistema de Informadministrado de la Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo en Krakovo. La sistemo konstituas interretan platformon kiu helpas la instruprocezon kaj lernejan administradon. Ĉiu rajtigita sistemuzanto (t.e. laboranto aŭ studento de la Lernejo) povas, utiligante la Interreton, tuj enigardi en informojn lin koncernantajn. La donitaĵoj estas atingeblaj pere de TTT-legilo. Oni povas aliri la sistemon ne nur pere de la komputiloj instalitaj en la Lernejo, sed ankaŭ el sia laborejo kaj hejmo. Alivorte, ĝi estas platformo alirebla el ajna komputilo enmonde konektita al la Tut-Tera Teksaĵo kaj el ajna WAP-hava poŝtelefono!

La ebloj de la sistemo estas grandegaj. Ĝi estas la ĉefa kaj fidinda fonto de informoj liverataj al ni, studentoj, fare de la Lernejo. Per SUŜIO ni povas aranĝi ĉion, ekz. sciiĝi pri la ricevitaĵoj, prezenti petskribon, trovi la studhoraron, planon de la ekzamenperiodo, priskribon de la studobjektoj, aldonajn didaktikajn materialojn, informojn pri la biblioteka provizo kaj prunteprenoj (eblas rete rezervi librojn) aŭ gravajn anoncojn kaj informojn alsendatajn de la laborantoj de la Lernejo. Pere de la sistemo oni povas kontaktiĝi kun ajna instruisto, administracia laboranto aŭ grupestro.

La alia sistemo — SAKE — estas e-lerna platformo. Danke al ĝi ni havas aliron al diversaj moduloj, i.a. e-lernado, enretaj testoj, enketoj, sistemo gvidi kaj enarĥivigi diplomlaboraĵojn, direktado de la aliro al la lerneja sendrata reto kaj diskutforumo. Krome ĝi estas sistemo ebliganta aliron al didaktikaj materialoj kaj sendadon de solvitaj taskoj al la instruistoj.

La studentoj de la Supera Lernejo de Direktado kaj Bankismo estas maniuloj de SUŜIO kaj SAKE kaj ne plu imagas sian vivon sen tiuj “japanaj frandaĵoj”. Ili tre faciligas nian vivon kaj komunikadon dum la studado.

Michał SZLACHETKA, studento de la tria jaro

Kubo atendas vin!

La urbo Matanzas

Matanzas [matansas], ofte nomata Ateno de Kubo pro la frua kaj altnivela kultura kaj klera etoso, ankaŭ famas pro la plurnombraj pontoj, arkitekturo kaj muziko. Ĝi estas urbo konstruita ĉe la maro, tuj malantaŭ granda haveno situanta je 42 km okcidente de Varadero, kaj je 120 km oriente de Havano.

Iama ĉefurbo de sukero kaj arto, la urbo Matanzas posedas vizitindajn lokojn kiel la teatro Sauto [saŭto], la katedralo Sankta Karlo, la Historia Muzeo kaj la parko Libertad, inter aliaj belaĵoj. Ĝi estas ideala loko por ĝui la famajn rumbojn kaj aliajn tradiciajn muzikajn ĝenrojn.

Hotelo Islazul Canimao

Sur deklivo rondiranta la riveron Canimar [kanimar], navigebla tra kelkaj kilometroj, oni trovas la hotelon Canimao [kanimao], ideala por ĝui kompletan feriadon meze de trankvila kaj natura medio. Ĝia proksimeco al

la bela urbo Matanzas, en la samnoma provinco, ebligas al la vizitantoj ekskursi al diversaj kulture kaj historie tre interesaj lokoj, miri pri ties arkitekturo, ĝui la belan havenon kaj promeni sur ĝiaj viglaj stratoj.

Oni povas ankaŭ viziti la faman banlokon Varadero kies natura beleco igas ĝin la plej populara en Kubo. Aliaj turismejoj en la proksimeco estas la grotoj de Bellamar kaj la kabaredo Tropicana Varadero, kiu proponas neforgeseblan vesperon per unika, tipe kuba spektaklo.

La hotelo Canimao disponas pri 158 komfortaj ĉambroj klimatizitaj, ĉiuj kun privataj necesejoj kaj duŝo, radio kaj satelita TV, kun alekstera videblo; restoracio, kafeterio, trinkejo, nokta klubo, naĝejo, ludejo, masaĝ-ĉambro, reta servo, vendejo, monŝanĝejo, sekureca kaso centra, kunvenejoj kaj parkejo.

La konferenco

La hotelo Canimao ludos centran rolon en la konferenco, tiel ke ĉio estos konvene lokita. ILEI ofertos pakajon prezon (baldaŭ anoncota), kiu inkluzivos du manĝojn tage, la loĝigon, alvenon kaj foriron plus iujn ekskursojn. La programo havos tri esencajn fadenojn: fakan, laboran kaj distran. Ni planas la programon tiel, ke ĉiuj tri fadenoj povos en ekvilibro disvolviĝi. ILEI prenis kontakton kun UEA, por ke ilia flug-oferto inkluzivu konvenajn flugojn por konferencantoj (la datoj provizore estas julio 11-17) kaj kun la loka organiza teamo, por ke junaj instruistoj el Kubo kaj najbaraj landoj havu eblon partopreni.

Unika semajno atendas vin!

Redakciaj informoj

Respondeca eldonanto (verantw. uitgever): Iwona KOCIEBA, *Graaf de Fiennesln 54, BE-2650 Edegem*. **Presado**: Flandra Esperanto-Ligo, *Frankrijklei 140, BE-2000 Antwerpen*, tel: (+32-3)-234 34 00. **Redaktejo**: NÉMETH József, *HU-8531 IHÁSZ, Fő u. 41/5*, <jozefo.nemeth@gmail.com>, <http://www.ilei.info/ipr/>; tel: (+36-89) 356-050. La revuo aperas ankaŭ kasede registrita por leghandikapuloj. Informas: Rob MOERBEEK, *Zwaansmeerstraat 48, NL-1946 AE Beverwijk*, <r.moerbeek@wanadoo.nl>.

La nunan numeron ni sendis al la presejo 31 aŭgusto, redaktfino por la sekva numero 30 novembro 2009.

Fotoj: *Titolpaĝo*: Urborigardado kun Piotr Nosek; Violonistinoj en Zakopane.
Interna dorskovrilo: ILEI-seminario en Kinshasa. *Dorskovrilo*: Szerdahelyi-Simpozio en Białystok (supre: Probal Dasgupta kaj Ilona Koutny, malsupre Renato Corsetti, Mauro La Torre, Fabrizio Pennacchietti kaj Harmut Trautmüller)

Laborkomisionoj

Ekzamena: Mireille Grosjean (Prezidanto), Reza Torabi (Sekretario), Julián Hernández Angulo, Antonio Leoni de León, Oliver Mazodze, Mónika Molnár
Elekta: Tiekio Isikawa, Ana Montesinos de Gomis, Aurora Bute
Kontrolo: Ulla Luin, Bengt Jonsson, Marianne Westman
Lerneja: Carola Antskog, Jennifer Bishop, Ronald Glossop, Julián Hernández, Tiekio Isikawa, Marija Jerković, Luigia Madella, Jacqueline Poux, Ermanno Tarracchini, Mihai Trifoi
Regulara: Marija Belošević, Rob Moerbeek, Atilio Orellana Rojas
Terminara: Mauro La Torre, Miroslav Malovec
Universitata: Duncan Charters (gvid.), Aida Čížikaitė, Ilona Koutny, Radojica Petrović, Kristin Tytgat

Kunlaborantaj institucioj

EEU: *Eŭropa Esperanto-Unio*. Komisiito pri instruado kaj rilatoj kun ILEI: **Carola Antskog**, Brokärrvägen 89, FI-25700 Kimito, Finnlando, cantskog@kolumbus.fi
E@I (*Esperanto ĉe Interreto*, www.ikso.net): faka sekcio de **TEJO** (poŝtadreso ĉe UEA).
FIPLV (*Internacia Federacio de Instruistoj de Vivantaj Lingvoj*):
Reprezentanto de ILEI: **Jennifer Bishop**, esperanto@Education.monash.edu.au
IEI: *Internacia Esperanto-Instituto*, Riouwstraat 172, NL-2585 HW Den Haag, Nederlando.
TEJO: Observanto de TEJO ĉe ILEI: **Gregor Hinker** (<http://www.tejo.org/>).
UEA: *Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando*. www.uea.org. Observanto de ILEI ĉe UEA: **Radojica Petrović**. A-komitatano el ILEI: **Atilio Orellana Rojas**. Observanto de UEA ĉe ILEI: **Claude Nourmont**. Reprezentanto de ILEI en la Afrika Komisiono de UEA: **François Hounsounou**
UNESKO (en neformalaj rilatoj): Reprezentantoj de ILEI: **François Lo Jacomo**, 72, quai de la Loire, FR-75019 Paris, francois.lojacomo@wanadoo.fr; **Monique Arnaud**, Ecole Chemin de l'Espéranto, Les Pelloux, FR-05500 Benevent et Charbillac, monique.arnaud@tiscali.fr; **Jean-Pierre Boulet**, 17 Av. de la Dordogne, FR-63800 Cournon d'Auvergne, tel.: (+33) 4 73 84 90 60; **Mireille Grosjean**, Temple 20, pf. 9, CH-2416 Les Brenets, tel/fakso: (+41 32) 932 18 88, mirejo.mireille@gmail.com

Membreco kaj pagado por aliaj servoj

Membreco kostas 18 EUR en A-landoj (laŭ UEA-difino) kaj 9 EUR en B-landoj, kun ricevo de 4 numeroj de IPR jare. Kun aliro nur al reta versio, membreco kostas 4 EUR (A) kaj 2 EUR (B) (validaj ĝis dec 31, 2009). Bonvenaj estas donacoj al la fondaĵoj de ILEI, konferencaj pagoj kaj abonoj por Juna amiko. Sekciestroj en trideko da landoj akceptas membrigojn kaj donacojn; simile, perantoj por Juna amiko akceptas abonojn enlande. Por pagoj rekte al la internacia ILEI informu skribe al la kasisto de ILEI: **Sjoerd Bosga**, Tvärpilsgratan 14, SE - 723 53 Västerås, *Svedio*, sjoerd@esperanto.se.

La pagoj povas okazi pere de konto de ILEI ĉe UEA, aŭ al la sveda konto.

* Pagoj al konto de ILEI ĉe UEA: Pri pagmanieroj vidu informojn en la Jarlibro de UEA. Atentu pri aldono de sumo por bankkostoj. Indiku vian nomon kaj landon, mallonge la celon de la pago, kaj unu el la tri kontoj ilek-a (ĝenerala), juna-l (Juna amiko), pike-b (projekto Interkulturo).

* Pagoj al la sveda bankkonto: El Svedio pagu al konto 8327-9, 994 515 014-3 ĉe Föreningssparbanken. El aliaj landoj pagu al IBAN SE56 8000 0832 7999 4515 0143 kun BIC/SWIFT kodo SWEDSESS. Aldonu 6 eŭrojn por svedaj bankkostoj se vi pagas el ekster Eŭropa Unio.

* Simpla abono de IPR sen membreco: 18 EUR. Reklamtarifoj por IPR: 180 EUR por plena, 110 EUR por duona kaj 70 por kvarona paĝoj. Tio inkluzivas bazan grafikan pretigon: kostojn de ekstra pretigo oni rajtas fakturi. Sekcioj reklamante edukajn projektojn rajtas peti trionan rabaton.

ILEI estas jure registrita ĉe la Komerca Ĉambro en Den Haag sub numero 27.181.064.

Hejmapaĝo de ILEI: <http://www.ilei.info>.



El la solena fermo de la ILEI-Seminario en Kinshasa (vd. p. 30)



Kun atestiloj kaj librodonacoj de ILEI (vd. p. 30)

